der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

25. Jahrgang Nr. 157 (5/1989) ISSN 001 4-0619 30 Pf

JES

al agra '89

„JES" estas la mallongigo por Jarmeza Esperantista Semajnfino" kaj „agra" la nomo de la konstanta agrikultura ekspozicio de GDR en Leipzig-Markkleeberg. Ĉar en la prezidio de la Distrikta Estraro de Kulturligo Leipzig kunagadas la diversaj reprezentantoj de la organizaĵo, inter ili la prezidantino de la DE de GDREA Sabine Schulze kaj la direktoro de „agra", d-ro Karl-Heinz Poosch, naskiĝis ideo pri kunlaboro. Kial ne forlasi la verdan izolitecon kaj eniri la verdan medion? (Vi certe kaptis la almenaŭ tri signifojn de „verda").

„agra" por la kamparanoj de GDR estas kvazaŭ „Universitato meze de verdaĵo". „agra" estas konata ankaŭ eksterlande.

Ĉiujare dekmilojn da vizitantoj el pli ol 100 landoj havis la granda ekspozicio. Ĉiun kvinan jaron „agra" estas internacia kun partopreno de ekspoziciantoj el la membroŝtatoj de la Konsilio pri Reciproka Ekonomia Helpo.

La tuta tereno de la ekspozicio ampleksas areon de 135 hektaroj, el kiuj 100 hektaroj estas destinataj por eksponaĵoj kaj 35 hektaroj estas areo de parko, inkluzive de 19 hektaroj da forsta tereno.

Dum la ekspozicioj oni aranĝas pli ol 40 halojn kaj pavilonojn havantaj preskaŭ 5 000 m² da tegmentita areo, krome 15 centrojn de demonstrado kaj subĉielajn terenojn por la planta kaj besta produktado, por la forstmastrumado kaj mekanizo kun entute 6 000 m² da areo.

La unua agrikultura ekspozicio „agra" okazis en la jaro 1950. Jen do la granda kaj grava kadro, kie okazis JES 1989. La aranĝo okazis de la 23-a ĝis la 25-a de junio. Partoprenis 250 esperantistoj el Aŭstrio, Bulgario, ĈSSR, FRG, GDR, Hungario, Italio, Nederlando, Pollando, Sovetunio kaj Usono. Ĉiu partoprenanto ricevis koloran 16-paĝan prospekton pri „agra" en Esperanto kaj belegan germanlingvan koloran informbroŝuron pri la agrikulturo de GDR, al kiu estis aldonita 20-paĝa esperantlingva traduko (sen fotoj).

La programo, kiun preparis la Loka Organiza Komitato sub gvido de Michael Behr, estis varia kaj interesa.

La malferman vesperon vendrede partoprenis la direktoro de „agra", d-ro Karl-Heinz Poosch, kiu salutis la partoprenantojn kaj donis klarigojn pri la ekspozicio. La solena inaŭguro, sabate antaŭtagmeze, estis dediĉita al la 40-jariĝo de GDR kaj al honorigo de la germana kamparanmilita revo-

luciulo Thomas Müntzer. Pri la jubileo de la socialisma ŝtato prelegis la vicprezidanto de GDREA, Manfred Arnold. Le verkon de Thomas Müntzer omaĝis Fritz Wollenberg. Posttagmeze kaj dimanĉe antaŭtagmeze sekvis entute ok fakaj prelegoj: Nutraĵoj el al maro (R. Burmeister/W. Hofmann), Bonsai — envazaj miniaturaj pejzaĝoj (B. Mann), mia hobio — abelbredado (A. Fichtner), pejzaĝoj post karbominado (d-ro H. Werner), problemoj de redaktado de faka ĵurnalo (d-ro Hradil), la socibonfartigoj de la arbaro de GDR (I. Ulrich), ĉu la laiko povas helpi por vivteni la arbaron? (d-ro K.-H. Simon), kion la unuopulo povas fari cele al medioprotektado? (R. Schindler).

Krom la prelegoj estis abundaj eblecoj viziti la diversajn ekspoziciajn halojn kaj pavilonojn, la halojn kun la temoj „Naturprotektado en GDR", „Mastrumado de ĉasbestoj en GDR", „Objektoj el la historio de la agrikulturo" k. a.

La esperantistoj do estis meze inter la vizitantoj. Tio eble ĝenis iom la tradician izoliĝemon de ŝamideanaj rondoj, tamen efike demonstris eksteren, ke Esperanto vivas.

La prezidantino de la DE Leipzig de GDREA, Sabine Schulze, cetere, kiel radioĵurnalistino estis la ĉefaparolistino de la ekspozicia radiostacio kaj ankaŭ informis pri la esperantista programo.

La vesperaj aranĝoj donis eblecon al amikaj interbabiloj. La Loka Organiza Komitato faris grandan laboron. Pro tio nian dankon meritas aparte Helga Beau, Michael Behr, Wolfram Diestel, Ute Helmstedt, Alfred Hoening, Wolfgang Hofmann, Ino Kolbe, Wibke Kranich, Ingrid Richter, la geedzoj Schadde, Ursula Schmidt, Steffi kaj Gertraud Schreiter, Sabine kaj Joachim Schulze kaj ne laste, la instruktoro de la distrikta sekretariejo de Kulturligo, Dieter Haas, kiu efike solvis diversajn problemojn.

Denove la esperantistoj el Leipzig pruvis, ke ili kapablas organizi originalan kaj valoran aranĝon.

— e

Intervjuo kun Sergej Kuznezov

(Vicprezidanto de SEU, Minsk, 3. 4. 89)

— Kiel estiĝis SEU kaj kiun funkcion ĝi havos?

Dum la tria konferenco de ASE en januaro (23. — 25. 1.) oni decidis refondi la iaman tutsovetian organizaĵon de sovetiaj esperantistoj, kiu nomiĝis SESR en la rusa lingvo, SEU en Esperanto. SEU signifas Sovetrespublikara Esperantista Unio. Temas pri tiu organizaĵo kiu estis kreita en 1921 kaj kiu ĉesis funkcii en 1938. Tamen ĝi ĉesis funkcii ne pro iu ŝtata malpermeso, sed pro tio, ke en nia lando ĝenerale kreiĝis tia atmosfero kaj tia situacio, ke la agado por la internacia lingvo ne plu estis ebla, kaj eĉ multaj esperantistoj kaj gvidantoj de SEU estis arestitaj. Kelkaj pereis, kelkaj postrestis, kaj ili iniciatis restarigi tiun organizaĵon. Kiam oni planis la konferencon de ASE, oni ne havis oficialan planon restarigi SEU. Oficiale oni volis decidi pri la sorto de la tutsovetia organizaĵo de esperantistoj, kiu, mi devas diri, estis en profunda krizo, ĉar dum longa tempo ne estis kunvokita la konferenco (kontraŭe al la statuto de ASE), oni malobeis la preskribojn de la statuto ankaŭ en aliaj rilatoj, kaj verŝajne pro tio okazis skismo en nia movado: la ĉebaltaj respublikoj fondis siajn proprajn asociojn, estonan, latvan kaj litovan, kaj tiuj asocioj informis la gvidantaron de ASE, ke ili ne plu apartenas al la ekzistanta tutsovetia strukturo. Ili tamen promesis, ke ili pripensos sian partoprenon en tutsovetia organizaĵo post la konferenco.

Do, la celo de la konferenco estis konsideri la estontecon de nia mova-

do, kaj ankaŭ oni devis decidi pri oficialaj ligoj kun la ministerio de kulturo, kun SSOD, kaj pri ŝanĝoj de la statuto. Oni diskutis pri du diversaj projektoj de nova statuto, unu projekto estis preparita de oficiala komitato de la prezidio, kiun oni formis antaŭ la konferenco, en tiu projekto temis pri kelkaj pli fortaj organizaj ligoj kun la ministerio de kulturo, tamen ne pri iaj radikalaj ŝanĝoj. En tiuj kondiĉoj mi opiniis necesa pli radikale ŝanĝi la situacion, kaj mi proponis paralelan projekton de la statuto, kies gvida ideo estis restarigo de SEU sur la bazo de ĝenerala demokratiigo de la E-movado en nia lando. Oni akceptis la ideon de restarigo de SEU, kaj ankaŭ oni akceptis kiel provizoran tiun projekton de la statuto, kiun mi verkis antaŭ la konferenco. Tio estis laŭ mi la plej gravaj decidoj de la konferenco, kiu eĉ konsideris sin ne kiel la lastan konferencon de ASE, sed kiel la unuan kongreson de la restarigita SEU, aŭ la okan kongreson de SEU, laŭvice en la historio de SEU.
Tio ne signifas, ke oni solvis ĉiujn ekzistantajn problemojn, oni nur estas survoje al ties solvo. Temas pri starigo de novaj, pli vastaj rilatoj kun ekzistantaj ŝtataj organizoj, temas pri la reoficialigo de SEU (fakte ĝi neniam estis maloficialigita, ĉar oni neniam ĝin malpermesis, tamen oni devas oficiale refunkciigi SEU kun la nova statuto). Krom tio temas pri la esploro de novaj eblecoj por internacia kunagado, pri aliĝo al UEA*), pri plivigligo de nia scienca kaj organiza laboro, kaj estas aliaj tre gravaj kaj urĝaj taskoj, inkluzive de eldono de periodaĵoj, de libroj ktp. La konferenco elektis novan prezidion laŭ la nova statuto, prezidion de SEU ne plu de ASE. Ĝi konsistas el la nova prezidanto (Vladimir Samodaj) kaj aro de vicprezidantoj; mi ankaŭ estis elektita vicprezidanto kun la tasko okupiĝi pri scienca agado, pri eldono de sciencaj verkoj, ankaŭ vortaroj, pri esperantologio kaj interlingvistiko.

— **Ĉu oni povas antaŭvidi la daton de la oficiala agnosko de la refunkciigo de SEU?**

Pri tio mi ne multon povas diri. Mi opinias, ke en la nova atmosfero de plinovigo, plimodernigo de nia vivo, plidemokratiigo, oni devas esperi je agnosko de nia organizaĵo. Des pli ke ĝi povas plenumi gravajn sociajn rolojn en la plifirmigo de la paco, en la diskonigo pere de Esperanto de realaj faktoj pri nia nuna socia vivo; oni publikigis paroladojn de Gorbaĉov, aliajn oficialajn dokumentojn, kaj tiel oni povas plenumi la bezonojn de tiuj esperantistoj en eksterlando, kiuj volas scii faktojn el la fonto. Kaj ankaŭ enlande tiuj dokumentoj estas gravaj, ĉar oni povas uzi ilian materialon por kompletigo de novaj vortaroj, Esperanta-rusa kaj rusa-Esperanta. Kaj ĝenerale tiaspecaj tradukoj helpas multe al la evoluigo de la faka lingvo en Esperanto kaj estas laŭ mi ankaŭ lingve grava afero.

— **Ĉu estas ĝusta mia impreso, ke la sovetia movado komenciĝis disfali en diversajn movadetojn, kaj ĉu eble SEU estos iu tegmenta organizo por ĉiuj, ĉar vi parolis pri respublikoj, kiuj fondis memstarajn asociojn, mi vidas tiun organizaĵon, kiu invitis nin al Minsk, FEJA, ekzistas memstaraj Esperanto-kooperativoj ktp. Ĉu tiu proceso estas danĝera por la sovetia movado?**

Mi opinias, ke ĝuste tio estas pozitiva proceso, ĉar oni nun ne volas sekvi la solan vojon, sed provis diversajn solvojn de la problemoj; oni trovas tute novajn eblecojn por starigo de kontaktoj, ĉu kooperativajn, ĉu profesiajn, ĉu junularajn, kaj tio helpas al la multflankeco de la Esperanto-movado en nia lando. En tiuj kondiĉoj mi opinias, ke la movado plivigliĝas sur ĉiuj ties niveloj, kaj tio kontribuas al la ĝenerala evoluo de la Esperanto-movado kaj de tutsovetia organizaĵo.

— **Dum tiu ĉi renkontiĝo en Minsk ni plurfoje aŭdis la opinion, ke SEU same kiel ASE multe parolas kaj nenion faras. Ĉu estas iuj agadoj de SEU nun, aŭ ĉu ĝi ne povas aŭ ankoraŭ ne rajtas agi?**

Mi opinias, ke la plej grava sfero nun ne estas SEU. La plej grava sfero kie oni

povas montri sian aktivecon estas la kluboj. Mi vidas ĝuste en tiu sfero tre gravan plivigliĝon de la movado. En Moskvo jam delonge ekzistas kelkaj kluboj, tamen ne sufiĉe fortaj; nun fondiĝas tute novaj kluboj, venas novaj homoj, estas organizitaj kursoj ktp. Do, la sorto ne estas en la manoj de iu ASE, SEU aŭ alia tutsovetia organizaĵo. La sorto estas en la manoj de la praktikantaj esperantistoj, kiuj unuiĝas kaj laboras sur la kluba nivelo.

— **Mi tre miras pri la ĝenerale alta lingva nivelo de multaj sovetiaj esperantistoj ĉi tie. Kiamaniere sovetianoj lernas Esperanton?**

Nu, estas kursoj, kiel mi jam diris, oni publikigis kelkajn lernolibrojn de Esperanto, krom tio multe helpas ankaŭ la praktiko de komunikado. Mi ankaŭ volas atentigi pri alia fenomeno: ĝenerale oni nun multe diskutas la fenomenon „lingvo kaj nacio" en nia lando. Kaj tie ankaŭ estas freŝa vento kiu multe ŝanĝas la atmosferon de la Esperanto-movado en nia lando. Ĉar temas pri lingvoj en konkreta socialisma socio, Esperanto ankaŭ povas ĝui novajn eblecojn. En multaj partoj de Sovetunio ekestas naciaj lernejoj, kie estas instruataj novaj lingvoj, oni multe parolas pri la publikigo de diversaj artikoloj, lernolibroj ktp., kaj Esperanto troviĝas nun en tute novaj sociaj kondiĉoj. Tio altigas la nivelon de la Esperanto-movado, ĉar interne de la movado oni multe diskutas pri tiuj lingvoproblemoj, pri la lingva situacio en Sovetunio, oni publikigas en esperantistaj medioj, oni faras signifoplenajn raportojn pri ĝeneralaj lingvoproblemoj en, ekzemple, Ĉebaltio, en Siberio ktp. Tio donas novan impulson, novan stimulon al nia movado.

— **Ĉu Esperanto en Sovetunio estas rigardata konkurenca lingvo al la rusa?**

Ne, ĝi neniel povas esti konkurenca al ajna lingvo, ĉar ĝuste nun ni evoluas en tute inversa direkto. Ni iras al plurlingveco. La pluralismo, aŭ plurismo, estas la celo de la movado socia kaj de la movado lingva. La lasta celas pliriĉigi lingvojn kaj plinombrigi lingvojn, kiuj estas aktuale uzataj. Kaj se oni pligrandigas la nombron de la lingvoj, des pli oni bezonos pontolingvon. Tio signifas, ke la rusa lingvo havos daŭre tiun funkcion de ponta lingvo, sed aldone oni povos havi aliajn pontolingvojn, kaj Esperanto estas tre bona instrumento por tiu ponta komunikado.

— **Kiuj estas laŭ via opinio la ĉefaj motivoj en via lando esperantistiĝi? Ĉu ili estas la kutimaj, aŭ ĉu estas iuj specifaj motivoj en via lando?**

Mi opinias, ke la motivoj ne ĉiam estas identaj al tiuj de la okcidenta mondo. Ĝenerale estas tute diversaj motivoj. Oni devus fari pri tio esploron aŭ statistikon, kiu ankoraŭ mankas. Mi povas nur paroli pri miaj personaj impresoj. Antaŭ kelkaj jaroj estis motivoj tute individuaj, oni elektis Esperanton pro personaj kialoj, ĉar Esperanto donis kelkajn eblecojn de individua aktiveco. Oni povis pliriĉigi siajn kontaktojn, povis trovi rimedon esprimi siajn sentojn en nekutima formo. Tamen nun ekaperis novaj motivoj, ligitaj ĝuste kun la lingva situacio en Sovetunio. Se ĝenerale estas tre alta ondo de intereso al lingvaj problemoj, do ankaŭ intereso pri Esperanto altiĝas kun tiu ondo.

— **Kiel en Sovetunio estos organizita la kontakto kun la eksterlanda Esperanto-movado. Vi jam menciis UEA. Mi aŭdis, ke kluboj aŭ respublikaj asocioj memstare volas decidi pri tio.**

Dum la lasta konferenco aŭ kongreso, pri kiu mi parolis, ni akceptis gravan organizan principon, tio estas la principo de statuta libereco. Oni volonte lasos al ĉiuj ekzistantaj aŭ ekzistontaj Esperanto-organizaĵoj agi laŭ siaj propraj statutoj. Do, se iu organizaĵo volas havi internaciajn rilatojn, ĝi havu ilin, se tio estas permesata de la statuto de tiu organizaĵo. Mi opinias, ke en tiu senco SEU povos ludi gravan rolon, ĉar necesas ne nur apliki diversmaniere Esperanton, sed ankaŭ kunigi la fortojn kaj enlande kaj eks-

terlande. SEU povus kaj devus reprezenti la tutsovetian movadon en eksterlandaj organizaĵoj. Sed tio ne kontraŭas memstarecon de respublikaj asocioj aŭ eĉ de apartaj kluboj.

— **Eble lastan demandon: Kion SEU kaj la sovetia movado atendas de la esperantistoj de GDR?**

Nu, mi ne povas paroli nome de SEU, tamen mi parolos en la kvalito de ties vicprezidanto. Bone?

— **Bone.**

Mi opinias, ke ni tre alte taksus kunlaboron kun ĉiuj esperantistaj organizaĵoj en la tuta mondo. Tamen estas kelkaj komunaj trajtoj de tiuj esperantistaj organizaĵoj, kiuj ekzistas en socialismaj landoj. Ili agas en pli-malpli similaj kondiĉoj. Do ili devus, laŭ mi, plivigligi sian kunlaboron. Mi scias, ke en GDR la laboro estas farata tre altnivele, speciale pro tio ke, laŭ mia impreso, tiu laboro havas profesian kvaliton. Certe tie multe dependas de la agado de mia kolego kaj amiko Detlev Blanke. La organizo de diversaj sciencistaj konferencoj, la publikigo de gravaj libroj atestas pri la profesia nivelo de la agado de esperantistoj en GDR. Do mi opinias, ke ni povas uzi tiujn spertojn kaj vere profundigi niajn rilatojn, peni profesiigi ilin ankaŭ internacinivele. Kaj la kontribuo de GDR povus esti tre grava speciale en tiu sfero.

— **Mi kore dankas al vi pro la intervjuo.**

Intervjuis U. Becker

*) Intertempe okazis en Brajtono. La red.

En Ukrainio: UkrEA

La 20 — 21-an de majo 1989 ukrainaj esperantistoj en Poltava okazigis tutrespublikan Esperanto-konferencon. Post mallonga raporto de la Estraro de la funkciinta Ukrainia Respublika Filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (URF ASE) komenciĝis akraj diskutoj, batalelpaŝoj pri estonta sorto de la Esperanto-movado en Ukrainio. Estis pritraktitaj du alternativaj projektoj de estonta Esperanto-organizo, kiuj diferencis per mecenoj kaj strukturoj. Rezulte estas fondita memstara esperantista organizo — Ukrainia Esperanto-Asocio (UkrEA). La konferenco transformis sin en Fondan Kongreson de UkrEA. Nur malgranda ero da partoprenintoj (15) rifuzis ĝin eniri.
La kongreso plendemokratie per rekta, sekreta voĉdonado el du kandidatoj elektis prezidanton de la novkreita organizo — Evgeno Kovtonjuk. Li estas 33-jara kievano, prezidanto de la Kieva urba E-klubo de internacia amikeco „Ora pordego", vicprezidanto de la eksa URF ASE, estrarano de SEU. Al li helpas elektitaj ses vicprezidanitoj: Genadij Šilo (la unua), Vladimir Miŝĉenko, Dmitrij Cibulevskij, Jaroslav Zaĥarija, Semjon Vajnblat, Anatolij Miĥajlinko (reprezentanto de la meceno t. e. la ukrainia respublika sindikato). Kunordiga organo de UkrEA estas Plenumkonsilio, kiun konsistigas ankaŭ 15 gvidantoj de diversaj E-agadsferoj kaj konsilantaro de E-kolektivoj. Enkadre de UkrEA funkcios amiksocieto de Esperanto, kiun povos laŭdezire eniri ĉiu, ankaŭ eksterlanda, favoranto al UkrEA. Bonvenon.

La poŝta adreso de UkrEA, Poŝta kesto 165, SU-252001 Kiev-1, Soveta Unio.

Prezidio de UkrEA

Kongresoj en Kubo 1990

Kiel konate la 75-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1990 okazos en Havano, de la 14-a ĝis 21-a de julio. La kongreso de TEJO okazos same en Kubo, nome de la 21-a ĝis 28-a 7. Multaj anoj de GDREA demandas la Centran Oficejon pri eventualaj ŝancoj partopreni la kongresojn. Tiuj demandoj estas tute kompreneblaj. Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne povas komplete respondi ilin, sed almenaŭ parte:

1. La vojaĝoficejo de GDR dufoje malakceptis nian oficialan proponon disponigi al GDREA vojaĝgrupon al la kongreso. Tamen ni daŭrigas niajn klopodojn. Multo ankaŭ dependas de tio, ĉu Kuba Esperanto-Asocio atingos, ke la Kuba vojaĝoficejo proponas el tiu de GDR apartan grupon destinatan nur por la esperantistoj.

2. Iom malfaciligas la tuton, ke en Kubo multo de la kongreso estas pagenda per valutoj. Pro tio UEA postulas la kongreskotizon en guldenoj. Tio, kompreneble, solviĝas alimaniere, se ni havas vojaĝgrupon.
Interesitoj el GDR, kiuj volus (kaj povus!) pagi sian kompletan partoprenon memstare (do ankaŭ la kongreskotizon), i. a. hotelon, manĝojn, flugon kaj organizas sian partoprenon memstare, ne atendante eventualan grupon de la vojaĝoficejo, povus eventuale ricevi helpon flanke de GDREA por akiri la elveturvizon.

3. Ĉar pro usona bojkotado la Kuba flugkompanio ne flugas de ĉiuj grandaj flughavenoj de Eŭropo, necesas rapide mendi flugojn. En Eŭropo la kompanio havas regulajn flugojn i. a. de Berlin-Schönefeld (GDR), Kolonjo (FRG) kaj Madrido (Hispanio). Flugo de Berlin al Havano kaj reen kostas ĉirkaŭ 3 500 — 4 000 markojn.

4. La 1-a sekretario de FDJ promesis al GDREA grupon de la vojaĝoficejo Jugendtourist por partopreni la junularan kongreson 21. — 28. 7. 90 Playa Girón. Tiu ebleco ankoraŭ ne estas konfirmita flanke de Jugendtourist. Se ĝi konfirmoĝis, partopreneblecon GDREA donos unuavice al aktivaj kaj lingve bonaj junuloj, kompreneble.

Jen la aktuala situacio.

Freundschaft — Amikeco — Przyjaźń

Sub tiu ĉiu slogano startis inter la 12-a kaj 18-a de majo 1989 la kunlaboro de Junulara Kulturdomo Koszalin kaj laborkolektivo de Ph.-Müller-lernejo per reciprokaj vizitoj de iliaj gelernantoj. Je la 12-a de majo vojaĝis la Schwedt-anoj al Koszalin. Por la infanoj estis la nokta vojaĝo memkompreneble unu el la plej impresaj programeroj! Al la programo en Koszalin apartenis interalie: interkona aranĝo, ekskurso al ĉebaltmara urbeto Mielno, posttagmezaj vizitoj de germanaj infanoj en la familioj de iliaj polaj amikinoj por ludi, manĝi „Kukaron", diskoteko ktp. La 16-an de majo ni hejmenvojaĝis al Schwedt, akompanite de niaj polaj geamikoj. La tiea programo tiamaniere aspektis: vizitoj de Esperanto- kaj urbhistoria ekspozicioj, gustumi Schwedt-ajn glaciaĵojn, komuna koncerteto en klubejo de Kulturligo antaŭ la gepatroj kaj gastoj. Dum ilia restado en Schwedt loĝis la polinetoj en la familioj de siaj novaj geamikoj. Komence la infanoj nur reciproke okulumis, sed dum la adiaŭo kelkaj okuloj eĉ malsekiĝis ... Ili bone amikiĝis, kio certe instigos ilin pli bone lerni la lingvon internacian. Por la aŭtuno jam estas planite denove renkontiĝi en Koszalin, sed eble kun la gepatroj. Ili fervore subtenis la organizadon de tiu ĉi aranĝo kaj kelkaj eĉ ekinteresiĝis pri lernado de Esperanto. Nia kunlaboro nun sukcese startis kaj estis laŭdita de kelkaj flankoj. Ni esperas, ke por venontaj planoj la popolklerigado kaj Kulturligo pli „kuraĝe" subtenos nian agadon.

Dieter Wilke

TEC-NOVAĴOJ

Informoj el la Terminologia Esperanto-Centro de UEA

I. TERMINOLOGIA SEMINARIO

De la 12-a ĝis la 21-a de junio 1989 okazis en POPRAD (ČSSR) la unua Terminologia Seminario de TEC. Partoprenis 19 personoj el 9 landoj (Aŭstralio, Aŭstrio, ČSSR, GDR, FRG, Hungario, Jugoslavio, Kanado kaj Nederlando).

Diskutoj kaj interkonsentoj pri bazaj konceptoj de la terminologia laboro inter la organizontoj de tiu laboro estis la ĉefa celo de la aranĝo. Ĝian unikan signifon substrekis la fakto, ke reprezentantoj de DLT (d-ro Klaus Schubert), de TermNet (mag. Regina Thaller) kaj la gvidanto de la unua Terminologia Kurso en ROUDNICE, 1986 (inĝ. Jan Werner) rolis kiel „kunlektoroj".

Ĉeflektoro estis d-ro Edmund Brent, lingva konsilisto ĉe la ŝtata „Oficejo por la franca lingvo" (OLF) en Kebekio (Kanado) kaj universitata lektoro pri lingvistiko, kiu jus finis redaktadon de la franca versio de la lekciaro de E. Wüster (ENKONDUKO EN LA ĜENERALAN TERMINOLOGION KAJ TERMINOLOGIAN LEKSIKOGRAFION — el la germana originalo). Li alportis por ni sufiĉe nekutiman trejnmetodon. En tiu „per-problema lernado" la studantoj devas aktive kundetermini siajn specifajn lernocelojn kaj kvazaŭ „mendi" ĉe la lektoroj informojn, ekzercojn, eĉ prelegojn pri temoj, kiuj taŭgas por klarigi la problemsituacion kaj helpas prepari solvojn.

Laŭeble precizaj indikoj pri ĉies profesia edukiteco kaj priterminologiaj spertoj permesis praktikajn ekzercojn en formo de „miniaturaj terminografiaj projektoj". Du grupoj da gelernantoj povis elekti po unu subtemon el la fako „kemio" resp. „informadiko" por sisteme pritrakti ĝian nociaron dum 4 posttagmezoj. La lastaj du duontagoj estis rezervitaj por komune ataki la bazan temon „terminologio" — unu el la plej tiklaj taskoj, ĉar ne ekzistas Esperanta literaturo pri la temo kaj la koncernaj normoj de ISO ne estas sufiĉe maturaj por permesi simplan „tradukon".

La akompanaj kaj kompletigaj prelegoj, kiuj okazis dum 8 antaŭtagmezoj, similis pli al diskutoj. Ja estis ne nur permesite sed eĉ dezirite interveni per demandoj kaj defendi proprajn opiniojn. Jen kelkaj el la traktitaj temoj: „Ambiguo — difino kaj solvoj", „Sciofontoj por perkomputila tradukado (SCHUBERT)

„Dokumentado en Terminologio", „ISO, Infoterm, TermNet — en kompara kun strukturo de TEC" (THALLER/W. Blanke)

„Praktikaj spertoj pri terminografia laboro", „Polisemio — Homonimio", „Terminologiaj Principoj" (WERNER) „Normigo ĝenerale", „Terminologia Normigado", „Kriterioj de termina kvalito", „Akceptigo de terminaroj" (BRENT).

Precipe la temo de „Akceptigo" evidentigis la profundajn kaj ampleksajn teoriajn sciojn de la ĉeflektoro kaj liajn longjarajn praktikajn spertojn dum la anstataŭigo de anglaj medicinaj terminoj per franclingvaj en Kebekio. La plurdimensia taskaro de akceptigo devas komenci per detalaj esploroj pri la bezonoj de la uzontoj kaj povas fini nur post definitiva stabiligo de la ŝanĝoj ĉe la uzantoj. (Pri „Akceptindo" kiel ĉefa kriterio por terminfarado ĝis nun en Esperantio oni ne multe cerbumis).

Pro la sukceso de la seminario specialan dankon meritas Slovakia Esperanto-Asocio (SEA), kies gvidantoj plej malavare regalis nin per sia gastamo. En komplika situacio pro la daŭra rekonstruado de siaj belaj malnovaj domoj ili faris sian eblon por agrabligi al ni la restadon. Apartan mencion meritas la Sekretario de SEA, Milan ZVARA kaj la ĉefinstruisto Anton ZACHARIÁŠ, kiu dum la 10 tagoj

ekskluzive zorgis pri niaj bezonoj — de la precize organizitaj kafopaŭzoj ĝis la ĉiutaga multobligado de materialoj. Apartan plezuron kaŭzis lia ekinteresiĝo pri nia temo kaj la aserto, ke nepre estonte en siajn Esperanto-kursojn (almenaŭ por progresintoj) li volas enmeti la temon „terminologio". Bedaŭrinde la planita unutaga ekskurso „ŝrumpis" al duontaga (ĉar la „freneze" laborantaj seminarianoj ne volis perdi tro da tempo!). Tamen: 5 horoj en la „SLOVAKA PARADIZO" instruis al ni ke sub „normalaj kondiĉoj" tiu belega, relative „netuŝita" regiono estus tre taŭga ankaŭ por nura feriado.

Dumtagaj paŭzoj kaj vesperoj servis por intensivaj neformalaj sperto- kaj ideointerŝanĝoj. Jaŭde tamen okazis oficiala kunsido pri la demando „Ĉu TEC aliĝu al TermNet?" Post longa detala diskuto pri avantaĝoj kaj malavantaĝoj de tia aliĝo la seminarianoj esprimis sin unuanime por la membriĝo.

II. ISO/TC 37, InfoTerm kaj TermNet Heredaĵoj de WÜSTER

Eugen Wüster, dejunaĝa esperantisto kaj esperantologo, kreis sur tiu planlingva bazo la ĉefajn principojn de moderna terminologio-scienco kaj dumvive pluevoluigis ĝin al la „Ĝenerala Teorio pri Terminologio". Same li engaĝiĝis en la praktika flanko, instigante kaj ĉefkreante la terminologiajn rekomendojn de ISO/TC 37 (Teknika Komitato de ISO — Internacia Organizaĵo pri Normigo — kiu prilaboradas la fakon „Terminologio — principoj kaj kunordigado"). Lia lasta kreaĵo estis la Internacia Informcentro por Terminologio en Vieno, kiu estiĝis surbaze de kontrakto inter Unesko kaj la Aŭstria Norm-Instituto (ON) 1971 kaj laboras lige al ISO/TC 37. Ĝis sia morto en 1977 Wüster estis honorofica scienca direktoro de InfoTerm. Jam dum la unuaj jaroj evidentiĝis, ke la informa, dokumentiga kaj esplora CENTRO bezonas kompletigon per RETO de kunlaborantaj institucioj en la tuta mondo. Komenciĝis la organizado kaj neformala ekfunkciado de „Internacia Terminologio-Reto" (TermNet), kiu fine de 1988 oficiale registriĝis kiel asocio laŭ aŭstria juro, kun sidejo en Vieno kaj aktivecoj (principe) tutmonde.

En aŭgusto 1988 okazis unua kontakto inter TEC kaj s-ro GALINSKI, nuna direktoro de InfoTerm kaj Sekretario de ISO/TC 37, kiu proponis al TEC, ke ĝi fariĝu membro de la fondota TermNet. Dume la TEC-Estraro okazigis enketon inter gvidaj aktivuloj de la Esperanto-Movado kaj la granda plimulto de la respondintoj esprimis sin por tia aniĝo — malgraŭ gravaj skrupuloj koncerne niajn ankoraŭ malriĉajn rimedojn homajn kaj financajn. Sed fine venkis pripensoj ke estas

- ne nur granda honoro sed ankaŭ reala avantaĝo kaj ŝanco por Esperanto esti samrajte reprezentata en internaciaj terminologiaj rondoj;
- nia devo ne nur konsciiĝi pri la grava servo, kiun faris Esperanto al la Internacia Terminologio-Movado dum ties estiĝo, sed daŭrigi tiun tradicion per pluaj aktivaj kontribuoj;
- la plej nobla celo de „Fondaĵo Wüster" ebligi tiun aktivan partoprenon en la pluevoluigo de la vivo-verko de ĝia nomdonanto;
- tre verŝajne, ke ĉiuj sinceraj esperantistoj strecos siajn intelektajn kapablojn kaj materiajn rezervojn, kiam ili pli kaj pli komprenos la signifon de tio internacia kunlaboro, ne nur por la evoluo de nia faka lingvo sed ankaŭ por la statuso de Esperanto en ekstermovada medio.

La 7-an de julio 1989 la TEC-Estraro decidis, ke TEC fariĝu membro en TermNet.

III. Ĉu IFEF fariĝos pionira ekzemplo?

La ĉi-jara SAEST (Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) okazis de la 7-a ĝis la 9-a de julio en STRAŽNICE (ČSSR), la ĉarma „Ĉefurbo de Folkloro". Honore al la 150-jariĝo de fervojo en Ĉeĥoslovakio la ĉeftemo estis „Trafiko" kaj la plimulto el la 14 prelegoj traktis ĉi-fakajn temojn. Sed konsiderinde granda

atento estis ankaŭ dediĉita al terminologio ĝenerale kaj al la estonta eventuala kunlaboro inter IFEF kaj TEC.

Bedaŭrinde nek Joachim GIESSNER (prezidanto de IFEF) nek Gernot RITTERSPACH (sekretario de ties Terminara Komisiono kaj reprezentanto de TEC) povis realigi siajn planitajn ĉeestojn. Tamen estis viglaj diskutoj inter la IFEF-terminarfarantoj el diversaj landoj kaj TEC, reprezentita de W. BLANKE.

Nun, post la sukcesa fino de la multjaraj traduklaboroj pri la oficiala 6-lingva leksikono de UIC (Internacia Fervoja Unuiĝo) kiuj rezultigis suplementon al ties 4-a eldono kun Esperanto kiel 7-a lingvo, ja valoras zorge pripensi la pluajn paŝojn.

Kompreneble la terminaraj komisionoj de IFEF en diversaj landoj nun laŭeble rapide volas prepari siajn naciajn, dulingvajn versiojn de la granda baza vortlisto de UIC.

Tamen: jam okazis la unuaj provoj por prepari ankaŭ pli altan kvaliton: en diskuto estas unua specimeno de fervoja **difin**vortaro. Konsekvence leviĝas la demando ĉu ne eblus utiligi la ĝis nun akiritajn spertojn kaj la modelan organizitecon de pri-fervojaj specialistoj por ellabori **sisteman unu**lingvan **difin**vortaron en Esperanto? Tia modela laboro — eĉ se komence nur ampleksante kelkajn elektitajn subfakojn — povus utiligi la plej progresintajn eksciojn de la internacia (ekstermovada) terminologia laboro kaj la praktikajn spertojn ankaŭ de esperantistoj-terminarfarantoj en aliaj fakoj.

IV. ALVOKO

Malgraŭ diversaj obstakloj kaj problemoj, manko de homfortoj kaj materiaj rimedoj, la Terminologia Esperanto-Centro paŝo post paŝo elformiĝas. Aktuale ĝi pretigas sin por fariĝi aktiva membro en TermNet kaj tiel envicigi Esperanton inter la terminologie konsiderindajn lingvojn. Tio jam ne nur estas afero de TEC, sed de la tuta Esperanto-Movado. Ĉu la TermNet-membreco restos formala (kaj do la sufiĉe alta kotizo estos perdita), ĉu ni sukcesos plene profiti el la internacia kunlaboro por altnivele evoluigi nian fakan lingvon kaj eble eĉ pruvi, ke Esperanto pro sia planiteco estas precipe taŭga terminologio-lingvo — tio dependos i. a. de la komprenemo kaj helpo de la tuta Esperanta komunumo. Do, ankaŭ de vi!

Se vi volas subteni la agadon de TEC kaj interesigi konatulojn — jen kelkaj eblecoj:

1. Se vi interesiĝas pri kunlaboro en Terminografia Komisiono (TK) por ellabori terminaron de via propra (scienca) fako, petu registrigon kiel **„Fakulo"**.
2. Se vi deziras gvidi tian TK, reprezenti TEC-on en via faka aŭ landa Esperanto-Asocio aŭ en ekstermovada organizo, aŭ alimaniere partopreni en la organizado-gvidado de nia institucio kaj pretas investi tempon, forton kaj eble eĉ monon por instruiĝi pri diversaj aspektoj de terminologio, aniĝu al TEC kiel **„Organizanto"**.
3. Se vi (nur) volas regule ricevi informojn pri TEC, anoncu tion kaj vi estos registrita kiel **„Interesito"**.

Kontaktadreso por 1. — 3. estas:
TEC — Sekcio de Reprezentantoj
W. Blanke, O.-Nagel-Str. 110,
Pf. 113—05
DDR — 1141 BERLIN

4. Se vi volas (kaj povas) finance subteni la agadon de TEC, bonvolu transpagi vian donacon al UEA en Rotterdam, al la **„konto ‚wüster'"**. Eĉ malgrandaj donacoj bonvenos — ili validos kiel morala subteno!

Wera Blanke

[La punkto 4 de la alvoko evidente ne koncernas esperantistojn el netranspagipovaj landoj. Rimarko de la redakcio.]

En Teknika Altlernejo

La 28-an de aŭgusto 1989 d-ro Detlev Blanke prelegis pri la temo „Esperanto kaj scienco" antaŭ 30 instruistoj de la Teknika Altlernejo Merseburg, sekcio „fremdaj lingvoj". Ekzistas la plano tie komenci instruadon de Esperanto.

Konkurso por verkado de originalaj romanoj

La Eldonejo de Hungara Esperanto-Asocio anoncas konkurson por verkado de originala Esperanta romano. La konkurson rajtas partopreni ĉiu esperantisto el ajna lando, per romano ankoraŭ ne publikigita. Limdato por la alsendo de la konkursaĵoj estas la 31-a de decembro 1990. Adreso: Eldonejo de HEA, H-1368 Budapest-5, Pf. 193.

Principe estos aljuĝitaj du premioj. La gajninto de la unua premio, nomata „Premio Hungario" gajnos minimume 100 000 hungarajn forintojn plus ties kunmetitajn interezojn inter la 1-a de marto 1989 kaj la 31-a de julio 1991. La gajninto de la dua premio, nomata „Premio Budapeŝto" ricevos minimume 50 000 hungarajn forintojn, plus ĝiajn kunmetitajn interezojn inter la supre nomitaj datoj. Dume oni instigos hungarajn instancojn kaj entreprenojn kontribui al la bazaj premiaj sumoj, kiujn ofertas la Eldonejo de Hungara Esperanto-Asocio, deponante 150 000 forintojn en banko la 1-an de marto 1989. Pri la eventualaj entreprenaj kontribuoj ni raportos daŭre sur la paĝoj de Hungara Vivo. (Por ioma orientiĝo: 100 000 forintoj egalas nun[1]) al ĉ. 4 000 guldenoj, ĉ. 45 000 ĉeĥoslovakaj kronoj, ĉ. 14 300 GDR-markoj, ĉ. 5 960 bulgaraj levoj, ĉ. 5 650 sovetiaj rubloj. La premio estos pagebla principe nur en hungaraj forintoj, kiuj estas utiligeblaj nur en Hungario. Se la gajnintoj estos civitanoj de GDR, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Sovetio aŭ Bulgario, ili rajtos ricevi la premion laŭ sia elekto ĉu en forintoj, ĉu en sialanda valuto.)

La konkursaĵoj surhavu nur kaŝnomon, la veran nomon kaj adreson oni aldonu en aparta fermita koverto, sur kiu oni skribu la kaŝnomon. La kovertoj estos malfermitaj nur post la definitiviĝo de la decido de la internacia ĵurio, pri kies konsisto informos iu el la sekvaj numeroj de Hungara Vivo.

La konkursaĵoj devas havi la minimuman amplekson de 340 000 literspacoj (ĉ. 55—60 mil vortoj), maksimuma longeco ne estas difinita. La temo estas libera, sed ĝi ne povas esti kontraŭa al la bazaj humanismaj principoj. Unu persono rajtas konkursi per pluraj verkoj, kaj li/ŝi rajtas uzi malsamajn kaŝnomojn por la opaj konkursaĵoj. Principe oni ne ekskludas la eblon, ke ambaŭ premiojn gajnu la sama persono per du verkoj.

La verkoj devas sekvi esence la norman lingvouzon de Esperanto, la vortprovizo laŭeble restu en la kadroj de PIV kaj ĝia suplemento, krom en kazoj kiam semantikaj kialoj aŭ artaj celoj necesigas aplikadon de neologismoj aŭ de nenormaj lingvaj formoj. Vortoj ne troveblaj en PIV kaj ĝia suplemento devas esti glositaj.

La konkursaĵoj devas esti tajpitaj kun duobla interlinia spaco, tiel, ke sur paĝo de formato A/4 (formato de Hungara Vivo) troviĝu 28—32 linioj, en unu linio ĉ. 60 literspacoj. La supersignoj devas aperi en sia ĝusta formo, eventuale mane aldonitaj sur ĉiuj tri kopioj.

La proklamo de la premioj okazos dum la 76-a Universala Kongreso, somere de 1991. La gajninto laŭeble pli frue ricevos skriban informon.

La konkursantoj konsciu, ke la kopirajto de la premiitaj verkoj — por esperantlingvaj kaj hungarlingvaj eldonoj — aŭtomate kaj sen aparta pago iros al la Eldonejo de HEA por 6 jaroj. Dum tiu periodo HEA rajtas plurfoje aperigi la premiitajn verkojn en eldonkvanto laŭplaĉa. Tamen ĝi perdos tiun rajton, se dum du jaroj post la proklamo de la premioj ĝi ne eldonos la koncernajn verkojn. Tiukaze — kaj post 6 jaroj ĉiukaze — la kopirajto reiros aŭtomate al la aŭtoro.

La Eldonejo de HEA havos opcion ankaŭ por la aperigo de la ne premiitaj konkursaĵoj dum du jaroj, kontraŭ la honorario de 30 000 forintoj. La Eldonejo de HEA maksimume tri monatojn post la proklamo de la premioj devos decidi, ĉu ĝi deziras uzi tiun ĉi opcion. Se la decido estos nea, la aŭtoro rericevos ĉiun rajton pri sia verko; se ĝi estos jesa, la Eldonejo de HEA — kontraŭ la pago de la supre nomita honorario — ekposedos la kopirajton por du jaroj, por esperantlingvaj kaj hungarlingvaj eldonoj. [El „Hungara Vivo"

[1]) Tio „nun" jam pasis. La red.

„Esperanto-Libro-Servo" de GDREA

Ekde la 19-a de decembro 1987 ĝi ekzistas: La „Esperanto-Libro-Servo" de GDREA. La originon ĝi dankas pli al hazardo ol al speciala planado krei novan servon. La „Zamenhof-Festo '87" frapis al la pordo, kaj ankaŭ estis la demando rilate al iu libro-oferto. Tial iu prenis la aŭskultilon, kaj kelkajn tagojn poste Esperanto-libroj en valoro de precize 3 249,25 markoj ŝanĝis la posedanton komence komisie. La komenco estis farita por konstanta kunlaboro kun la Domo de la Hungara Kulturo en Berlino.

Ekde tiam demandoj kaj skribaj libro-mendoj ne ĉesas alveni. Ege rapide la intereso superis multfoje la fareblan oferton. La vendosumo de la Esperanto-Libro-Servo" en 1988 estis 6 853,10 markoj, sed sole en la unua duonjaro de 1989 jam estis 9 898,50 markoj. Ankaŭ evoluis la dissendado. En 1988 estis nur entute 42 poŝtmendaĵoj (86 libroj), sed en 1989 (1-a duonjaro) jam 126 sendaĵoj (264 libroj). Ke kelkaj mendint/in/oj devis (aŭ devas) atendi monatojn (kaj pli longe — bedaŭrinde!) por ricevi almenaŭ unu de la menditaj libroj, apartenas al la malĝojigaj, sed mallongtempe neŝanĝeblaj aferoj. Tio ankaŭ, ĉar la Domo de la Hungara Kulturo ne povas malobei iun limiton. Almenaŭ: Ekde 19. 12. 1987 ĝis 30. 6. 89 Esperanto-libroj en valoro de 16 751,60 markoj estis venditaj. Tio estas bona komenco.

Neklara restis la demandoj pri lerno-libroj, gramatik- kaj ekzerc-libroj. La plej mendita titolo plue estas Auld: „Paŝoj al plena posedo". (La 5-a eldono intertempe tute elĉerpiĝis, la 6-a estas preparota.) Krome multe estas menditaj: Seppik: „La tuta Esperanto" kaj „Turista kantaro". (Cetere en aŭtuno 1989 aperos reeldono de gramatiko de Göhl, kaj „Ni kantas".) Plejvendita: La libro de Szilágyi, „Kulturo de la seksa vivo". Aliaj titoloj venas kun granda distanco. Sed tio estas parte ŝuldita al la fakto, ke aliaj titoloj ne estis liveritaj tiel multnombre. Sur rangoj 4 kaj 7 la aŭtoro: Istvan Nemere, kies libroj ĝis nun estis menditaj aŭ forvenditaj 126foje.

Konsilo por la mendantoj

Kiu aldonas afrankitan koverton al sia letero, tiu ricevos senprokraste la aktualan monatan libro-oferton kaj — se dezirite — la hungaran liston „Esperantaj libroj el Hungario". La sama validas por skribaj mendoj (ĉikaze sufiĉas poŝtkarto). Libroj, kiuj ne estas tuj livereblaj, estos poste forsendataj laŭvice de la mendintoj. (Preskaŭ) nenio perdiĝas. Sed se iu havus la eblecon, dum eble longa atendotempo, aĉeti la libron alimaniere, tiu skribu tion al mi tuj! Des pli frue la venonta viculo havas la ŝancon akiri sian deziritan libron. Kaj laste: **Mendojn kaj plendojn ne plu sendu al la Domo de la Hungara Kulturo, sed rekte al mi:** Thorsten Lemke, Wetterseestr. 1, Berlin, 1100. Moto: „Esperanto-Libro-Servo".

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20.00 — 20.30	Eŭropo	40,1	7470
		19,7	15165
		30,1	9965
22.30 — 23.00	Latin-Ameriko	30,4	9860
		26	11515
11.00 — 11.30	Japanio, Koreio	31,6	9480
		43,1	6955
13.00 — 13.30	Sudorienta Azio	25,7	11650
		19,7	15165

UTC = Universala Griniĉa tempo

Ĉu artfilmo pri Esperanto?

Ni ripetu: Esperanto estas neŭtrala internacia lingvo — dua lingvo por ĉiu apud la patrina. Esperanto ne ofendas la nacian dignon de iu individuo aŭ popolo, sed donas ŝancon al pli bona kompreniĝo inter popoloj per senpera parolo de homo al homo.

Artfilmo pri la Esperanto-ideo — prezentebla mondskale per kino kaj televido — eble helpus malfermi la okulojn de eksterstarantoj pri la kreskanta neceso de pontlingvo, la urĝa bezono de „savoringo" meze de maro da plej diversaj lingvoj!

Konsciante, ke tio estas riska entrepreno, ĉar la temo estas granda kaj la rimedoj modestaj, mi tamen volas iniciati tian artfilmon.

La ĉefa problemo estas la elpensado de universale komprenebla, interesa kaj streĉa **fablo** (filmrakonto), ĉar ĝi decide influas la efikon de filmo.

Pro tio mi bezonas la helpon de **ĉiuj** interesitaj esperantistoj, kaj ne nur tiun de fakuloj pri beletro.

Fablo ĝenerale komenciĝas per nodiĝo de dramaj konfliktoj inter agantaj personoj. Tia nodiĝo povus estiĝi ekzemple per plagaj situacioj aŭ katastrofoj, kiam homoj de malsamaj nacioj nepre bezonas paroli unu kun la alia, sed ne kapablas, ĉar . . .!

La fantazio povas regi senlime rilate al loko, tempo, medio, motivo kaj personoj. La situacioj povas esti gajaj, seriozaj aŭ tragikaj. La plej eta epizodo, ĉiutaga observo, fikciaĵo aŭ vizio eble fariĝos fonto por instiga fablo.

Sufiĉus nur pens-instigoj — esprimitaj per kelkaj frazoj!

Ne hezitu sciigi vian ideon pro eblaj duboj pri ĝia uzeblo — aŭ ĉar ĝia vortigo povus kaŭzi problemojn. En ĉi tiu ŝtupo tute ne temas pri arta verkaĵo, sed via, eĉ plej modesta, helpo signifas jeson por Esperanto kaj ĝiaj idealoj.

Por la dua ŝtupo jam necesas fakuloj. Kiu aŭtoro — de ia ajn literatura genro — transprenus kune kun mi la dramigon de fablopropono(j) respektive la ellaboradon de scenaro? (Ĉio sen trorapido kaj tempolimo!).

Tiu ĉi nia laboro estus kvazaŭ hobio, donaco dediĉota al la esperantistaro por klerigi la „eksteran mondon".

Nur post finpretigo de la scenaro ekestus la demando pri filmproduktado. Anticipe koran dankon por ĉiu subteno.

Georg Leopold
Mozartstr. 11
DDR — 1205 Babelsberg

Redacia noto:

La skribinto estas filmreĝisoro, nun emerita, kiu dum sia profesia vivo produktis plurajn tre sukcesajn filmojn. Krome, ni ja konscias, ke jam ekzistas filmo pri Esperanto, prezentita en 1987 kaj produktita de Roman Dobrzynski kaj Donĉo Hitrov. Tamen, ilia filmo „Esperanto" estas ‚dokumenta filmo' kaj ne ‚artfilmo'. Do bv. konsideri la diferencon.

---

agra-informoj

Jen kolora esperantlingva broŝuro pri la konstanta agrikultura ekspozicio de GDR agra, kiu aperis en 1989 en Leipzig. Ĝin eldonis la sekcio pri publikaj rilatoj de agra. La grafikan aranĝon faris Joachim Schulze. Tradukis d-ro Erich-Dieter Krause. La 16-paĝa broŝuro estas senpage havebla ĉe agra, Raschwitzer Str. 11/13, Markkleeberg, DDR — 7113.

Doktoriĝo de Chrdle

La prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Petr Chrdle, fine de 1988 sukcese defendis kandidatigan disertacion, kiu respondas al la germana doktoriĝo. Ni kore gratulas. **GDREA**

Pri internaciaj respondkuponoj

Responde al demandoj de niaj legantoj, la redakcio informas: La „Internaciaj Respondkuponoj", kiujn eldonas la Monda Poŝtunio, en GDR ne estas aĉeteblaj.

Restarigota monumento en ĈSSR

Letero de Ĉeĥa Esperanto-Asocio:

Estimataj amikoj!

Ĉeĥa Esperanto-Asocio turnas sin al vi en urĝa afero ... Printempe 1914 (la 1-an de junio) estis inaŭgurita en Frantiŝkovy Lázně, ĉarma banurbo en la okcidenta parto de la nuna Ĉeĥoslovakio (tiam sub la Aŭstria Imperio), okaze de la IV-a Tutaŭstria Esperanto-Kongreso, la unua en la mondo granda monumento de L. L. Zamenhof, la fondinto de Esperanto. La unikan faron iniciatis la bavara fervojisto kaj loka Esperanto-klubestro Jacob Hechtl, kiu per monkolekto havigis la necesan sumon. La monumento estis kvarpilastra bloko el artefarita ŝtono, portanta supre bronzan reliefon de L. L. Zamenhof kun surskribo.

En la jaro 1938 nazioj komplete detruis la monumenton.

Ĉeĥa Esperanto-Asocio opinias sian moralan devon renovigi tiun ĉi historiaĵon por memorigi la monumenton, kiu staris jam antaŭ la du mondmilitoj en la banurba parko.

Por povi plenumi tiun intencon, ĈEA kunlabore kun UEA proklamas internacian monkolekton; ĉiu donacinto ricevos dokumenton pri sia kontribuo al tiu ĉi nobla celo. Kiu donacos minimume 40 NLG (gld), t.e. 200 ĉeĥoslovakaj kronoj, ricevos dankdiplomon, pro la donaco de minimume 400 NLG aŭ 2 000 kronojn ricevos medalon kun gravurita dankesprimo, ĉe donaco de minimume 5 000 NLG aŭ 25 000 kronojn, la nomo de la donacinto estos gravurita sur la monumento inter la merituloj pri la restarigo de la monumento. La premio por la donacinto de la plej alta monsumo estos miniatura muldaĵo de la monumento laŭ la skalo 1:20.

Ni kredas, ke vi trovos komprenon por la intencata ago kaj subtenos nian klopodon. La inaŭguron de la malnovnova monumento ni planas por la jaro 1992, samtempe kun la Universala Kongreso de Esperanto en Prago kaj grandskala internacia festo honore al la 400-a naskiĝdatreveno de la „Instruisto de Nacioj", Jan Amos Komensky-Komenio, menciata kiel „prapatro de la internacia lingvo".

La kontribuaĵojn bonvolu sendi al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, „lazn-g".

Nome de la komisiono pri la restarigo de la monumento

Petr Chrdle — prezidanto de ĈEA kaj komitatano de UEA

„Esperanto i Veliko Tirnovo"

„Esperanto kaj Veliko Tirnovo" — tiel nomiĝas malgranda bulgarlingva prospekto, kiun eldonis en 1988 la universitata scienca biblioteko „P. R. Slavejkov" en la konata bulgara urbo. La prospekto entenas 37 bibliografiajn indikojn pri artikoloj kaj intervjuoj, kiuj aperis en la urba gazetaro kaj en aliaj verkoj, i. a. de Olga Cankova, Humphrey Tonkin, Paul Neergaard, Maria Pontika, Hristo Gorov, Arpad Máte kaj Detlev Blanke. La prospekton ellaboris Olga Cankova, historiistino, kiu motoras en Veliko Tirnovo la priesperantan teorian agadon.

Invalidoj renkontiĝos

Esperantistoj-invalidoj de ĈEA invitas al solena renkontiĝo omaĝe al la 5-a datreveno de sia fondiĝo. La renkontiĝo okazos de la 8-a ĝis la 11-a de junio 1990 en Slaný, Ĉeĥoslovakio. Informojn petu: Esperantistoj-invalidoj, P. K. 63, CS — 27401 Slaný, Ĉeĥoslovakio.

Tridistrikta renkontiĝo en Arnstadt

La 17-an de junio en Arnstadt okazis la tradicia jam 10-a renkontiĝo de la distriktaj organizaĵoj de GDREA Erfurt, Gera kaj Suhl. Partoprenis 50 personoj. Prelegis i. a. d-ro Detlev Blanke.

El Vjetnamio

Turismo en Vjetnamio

Kun granda ĝojo mi informas vin ĉiujn pri la nova perspektivo de nia malproksima lando — Vjetnamio — rilatanta al nia komuna afero delonge atendata: Turismo al Hanojo.

Ĉefa celo estas plifortigi la rektan kontakton inter niaj geesperantistoj, konkretigi nian interhelpon, kontribui al la disvastigo de Esperanto ekster Eŭropo dum la dua jarcento de la Internacia Lingvo.

Malgraŭ tio, ke restas ankoraŭ malfacilaĵoj por la komenca etapo, Hanoja E-Klubo, en kunlaboro kun Hanoja Turisma Unio, povas akcepti verdajn turistojn el ĉiuj landoj kun modesta prezo por tiuj, kiuj volas viziti Hanojon kun ties periferioj, konatiĝi kun ties vidindaĵoj, kulturo kaj artoj, historiaj monumentoj, pagodoj, ktp ...

Por via konkreta programo, bonvole turnu vin al

— (HIÊP Hôi Du Lich Hanoi)
  Hanoja Turisma Unio: 23, Nguyên Dinh Chiêu strato, Hanojo.
  Tel. 52175
— Hanoja E-Klubo: 46 Trân Hung Dao str., Hanojo
— VPEA: 105 A Qan Thánh str., Hanojo.

Gastamaj Hanojaj esperantistoj bonvenigos vin!

Hông Hac, Klubestro de Hanoja E-Klubo

Muzeo pri Ho Chi Minh

Tiu grandioza konstruaĵo estas konstruata kun ritmo kiel eble plej rapida por akurate bonvenigi la Centjaran Jubileon de la naskiĝtago de Prezidento Ho Chi Minh en 1990.

La datreveno estos ne nur unu el la plej gravaj festoj en la jaro de la vjetnama popolo, sed ankaŭ vekas memorindan eventon de la tutmondaj progresemaj popoloj pri la homo, kies intelekta eminenteco kaj kultura personeco estis agnoskita de la 18C/ Rezolucio 4.351 far la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en novembro 1987, kiel vjetnama heroo de nacia liberigo kaj granda figuro de kulturo.

Kompreneble, la Muzeo pri Ho Chi Minh estos impona konservejo kaj ekspoziciejo pri ĉiuj materialoj kaj dokumentoj naciaj kaj internaciaj rilate al „Onklo Ho".

La vjetnama esperantistaro, sub la revolucia standardo de Ho Chi Minh, de 1956 ĝis nun uzadis Esperanton kiel instrumenton serve al la komuna revolucia afero de Vjetnamio al tutmondaj geamikoj pere de esperantaĵoj kaj cento da libroj ĉiuspecaj, inter kiuj estas la libroj pri Ho Chi Minh:

— Ho Chi Minh, Prezidento; Respektata gvidanto de la vjetnama popolo (1966)
— Ho Chi Minh, Kontraŭ la usona agreso por la nacia savo (1967)
— Ho Chi Minh, Anekdotoj pri la vivo, de Tran Dan Tien (1960)
— Ho Chi Minh — Tagkajero en prizono
— Ho Chi Minh, Prezidento (1970)
— Ho Chi Minh, Anekdotoj de vojaĝo (1971)
— Kun Onklo Ho (1972)
— Ho Chi Minh, Versaĵoj kaj prozoj (1980) ...

Rekompence, la vjetnamaj esperantistoj gajnis kaj ĝuas kaj la simpation kaj la subtenon al sia porpaca laboro flanke de MEM, de MEM-sekcioj kaj de la progresemaj esperantistoj en la tuta mondo.

Iliaj elkoraj sentoj al Vjetnamio, al Prezidento Ho Chi Minh estis esprimitaj en diversaj aspektoj, precipe enskribitaj en naciaj lingvoj kaj en Esperanto de pluraj revuoj, gazetoj, eĉ libroj. Parto de ili estis liveritaj al VPEA, kaj ni volas dediĉi ĉion por la muzeo, kiel modesta donaco de l'tutmonda esperantistaro okaze de la Centjara naskiĝdatreveno de Prezidento Ho Chi Minh.

K-do Vu Ky, direktoro de la Muzeo pri Ho Chi Minh, promesis rezervi indan lokon por eksponi la Esperantajn Dokumentojn rilatantaj Vjetnamion kaj Prezidenton Ho Chi Minh. Li ankaŭ volas, ke Esperantaj radioj, gazetaroj de ĉiuj landoj anoncu tiun informon pri la Muzeo, por ke oni povu bonvole liveri al la Muzeo tiucelajn dokumentojn ĉu en sia nacia lingvo, ĉu en Esperanto (pere de VPEA — 105 A Quan Thanh Hanojo).

Dang Dinh Dam sekretario de VPEA

Internacia Junulara Semajno '89

Kiel jam al la pasintjara IJS, kiu okazis en Szeged, ankaŭ en ĉi tiu jaro vojaĝis sufiĉe granda nombro de junaj GDR-esperantistoj (ĉirkaŭ 30) al Hungario. La aranĝo, okazinta inter la 8-a kaj 14-a de julio 1989, estis okazigita en la hungara urbo Szolnok. Oni loĝis parte en bangaloj, parte en tendoj. Multajn „malnovajn" konatulojn oni revidis, kaj la „Interkona vespero", tiufoje sub libera ĉielo kaj komencinta per ludoj, donis eblecon trovi novajn geamikojn. Tiujn kontaktojn oni povis profundigi ĉe bivakfajro.

Dumtage oni havis diversajn eblecojn pasigi la tempon: aŭ oni lernis la hungaran lingvon, aŭskultis aŭ diskutis pri diversaj temoj, iris al najbara naĝejo, partoprenis ekskursojn al ĉevalejo aŭ fabrikoj, promenadis tra la urbo aŭ dormis pro la maldorma antaŭa nokto. Tamen, la vesperoj reunuigis la plej multajn partoprenintojn. Tiel okazis la jam tradicia balo kun ŝturmo al la „malvarma bufedo" kaj belega prezentado de societaj dancoj. Je alia vespero ĉiuj promenadis al urba kinejo por rigardi la Esperanto-version de la konata filmo „Mefisto". „Nokta banado" (pli bone vespera) en najbara naĝejo ankaŭ apartenis al la riĉa programo, kies planado kaj realigo, same kiel ĉiuj aliaj aferoj de la organizado, funkciis sufiĉe bone, kvankam ĝi kuŝis nur en la manoj de malmultaj.

Speciala kulmino estis laŭ mi la „Internacia Vespero". Nekonataj kaj ne supozitaj talentuloj montriĝis. Krome ekzistis dum la vesperoj sufiĉaj eblecoj por dancemuloj. Sed ne nur la muziko „el la konservujo" ludis rolon, sed okazis diversaj oficialaj aŭ spontaneaj (en malgrandaj grupoj) koncertoj. Ĉi tie oni devas mencii la grandan muzikan engaĝon de la esperantistoj el Sovetunio, kiuj partoprenis ĉijare la unuan fojon tiom grandnombre. Do, la tagoj flugis preskaŭ tro rapide al fino. La finon oni celebris per sidado ĉe bivakfajro, vingustumado, kantado, babilado ... La adiaŭo estis verŝajne por ĉiuj iom malfacila, sed oni jam parolis pri ebla partopreno en venontjara IJS, kiu verŝajne okazos en la unua IJS-domicilo en la urbo Szeged. Estus bone, kiel kelkaj voĉoj diris, ĉar Szolnok ne povis konkuri kun Szeged, ĉu pro la urbo mem ĉu pro la pli bonaj ejoj por aranĝoj.
Do, ĝis revido en Szeged?!

Bettina Büchner

25-a Pola Esperanto-Kongreso

La ĉiu-jara manifestacio de la polaj esperantistoj okazis de la 15-a ĝis la 20-a de julio en Bialistoko. Ĉirkaŭ 400 partoprenantoj, inter ili el Finnlando, Francio, Nederlando, Bulgario, ĈSSR, GDR, Italio, Sovetio, Norvegio, Aŭstrio, Hungario, Malto, Ĉinio kaj Japanio. Du infanensembloj alvenis el Tbilisi kaj el Malto. La kongresa programo estis tre riĉa. Al ĝi apartenis artaj programoj, filmprezentadoj, urbogvidadoj, aŭskultantoj de Radio Polonia, Cseh-Kurso, diservoj, pacmanifestacioj, laborkunsidoj de PEA k. a.
GDREA estis reprezentita de sia vicprezidanto Rudolf Hahlbohm.

Junulara renkontiĝo en Prago

Jam la trian fojon pragaj gejunuloj okazigis Junularan Semajfinan Turisman Renkontiĝon (JuSeTuR), de la 25a ĝis la 28a de majo 1989, la unuan fojon sub aŭspicio de la naturprotekta klubo Aqualica. Preskaŭ 80 junaj esperantistoj el Hungario, Pollando, GDR, Ĉeĥoslovakio kaj FRG partoprenis la sukcesan aranĝon, vivis en bonkvalita pionira kabanaro ĉe valbaraĵo, amuziĝis, konatiĝis kun la urbo kaj ekskursis al la kastelo Konopiště.
Fine de majo 1990 okazos la kvara JuSeTuR. Jam nun informiĝu ĉe Vladimír Dvořák, prezidanto de la Junulara sekcio de ĈEA kaj kunorganizanto de JuSeTuR (Zelenecská 354/20, CS-194 00 Praha 9).

Kontrakto pri amikeco kaj kunlaboro: Rostock kaj OSRK

Dezirante kontribui per niaj rimedoj al pluevoluigo de la amikecaj rilatoj inter niaj popoloj kaj ŝtatoj kaj subteni per tio la porpacan politikon de niaj registaroj;
celante pliprofundigon kaj plifirmigon de la amikecaj rilatoj inter niaj asocioj, grupoj kaj membroj;
uzante la bonajn tiaspecajn spertojn faritajn el la amikeca kontrakto, ekzistanta jam kelkajn jarojn inter la subdistrikta organizaĵo Stralsund de GDREA kaj la Subtatra Esperanto-Klubo Poprad de SEA,
la **Distrikta Estraro Rostock de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR** kaj la **Orientslovakia Regiona Komitato (OSRK) de Slovakia Esperanto-Asocio** decidas:

1-e: Ambaŭ flankoj pludisvolvigas siajn interrilatojn surbaze de amikeco kaj reciproka kunlaboro. Ili subtenas la kunlaboron de siaj suborganizaĵoj kaj membroj, progresigas kaj pliviglgas la perkorespondajn kaj rektajn personajn kontaktojn inter ili.

2-e: Laŭ la jam tradicia partnereco inter Stralsund kaj Poprad ambaŭ flankoj parigu siajn suborganizaĵojn jene:
Rostock — Kosiče
Stralsund — Poprad
Greifswald — Stará Lubovňa
Wismar — Rožňava
Rügen — Spišská Nová Ves
DE Rostock de GDREA subtenas rektajn kontaktojn kun la Esperanto-klubo en Vranov n. T.

3-e: Ambaŭ flankoj subtenas la kunlaboron de siaj junularorganizaĵoj.

4-e: Ambaŭ flankoj interŝangas siajn spertojn pri infanlaboro. OSRK de SEA organizos porinfanan kaj junularan internacian Esperanto-tendaron, kiu okazu prefere en distrikto Vranov n. T. DE Rostock de GDREA organizos similan tendaron en kiu partoprenos infanoj kaj gejunuloj el SSR apartenantaj al SEA.

5-e: DE Rostock de GDREA kaj OSRK de SEA organizas kunlabore kun la koncernaj naciaj fakorganizajoj ĉiujare alterne en GDR kaj en SSR komunajn kunvenojn pri vivmedio kaj naturprotektado.

6-e: DE Rostock de GDREA subtenas SEA per laborbrigadoj helpontaj rekonstrui la asociajn domojn en Poprad kaj Betlanovce.

7-e: Ambaŭ flankoj subtenas sin reciproke en sia instrulaboro.

8-e: Ambaŭ flankoj interŝanĝas siajn materialojn kaj informas sin reciproke pri okazontaj aranĝoj.

9-e: Ambaŭ flankoj aperigas artikolojn de la alia flanko en sia informilo.

10-e: Ambaŭ flankoj invitas regionajn aŭ distriktajn E-organizaĵojn en tria lando partopreni ĉi-specan triflankan kontrakton.

11-e: La kontrakto estas precizigenda jare ambaŭflanke per labor- kaj vojaĝplano kaj daŭru ĝis revoko.

12-e: La kontrakton ambaŭ flankoj aperigu en „der esperantist", „Balta Mara informilo" kaj „Esperantisto Slovaka".

13-e: Po unu ekzemplero de tiu ĉi kontrakto estu donata al CE de GDREA kaj CK de SEA.
Poprad, la 24-an de julio 1989

Subskr. Anton Zachariáš
por ORK de SEA
Subsk. Uwe Hübner, prezidanto
de DE Rostock de GDREA

Modelo sekvinda

Konkreta kunlaboro inter la asocioj kaj ties partoj vigligas la Esperantan laboron. Jen — ni volonte publikigas la tekston de kontrakto, kiun subskribis la reprezentantoj de la Orientslovakia Regiona Komitato de Slovakia Esperanto-Asocio kaj de la Distrikta Estraro Rostock de GDREA.
Ni alvokas aliajn distriktajn estrarojn sekvi tiun modelon!

La gazetaro pri ni en 1988

1. Centraj gazetoj kaj revuoj de fakorganizajoj

1.1. Fakrevuoj kaj organoj de fakorganizajoj

— Die Deutsche Presse, n-ro 8/88 informoj pri E-agado enlanda kaj internacia!
— Mikroprozessortechnik, n-ro 2/88 komputora sistemo Esparol, n-ro 6/88 Esperanto-komputora jurnalo;
— Fahrt frei, n-ro 1/88 amplekse pri E kiel internacia komunikilo por fervojistoj, n-ro 7/88 E-renkontiĝo de fervojistoj;
— Der Stenopraktiker, n-ro 1/88 tutpaĝe pri E en ekzerca teksto; 6/145 cm

1.2. Aliaj centraj gazetoj kaj revuoj

— Neues Deutschland, SED, 10. 3. 88 E-kurso en vespera lernejo de Schwerin, 5. 4. 88 informo pri E-broŝuro, 12. 5. 88 kulturagado de E-junuloj, 13./14. 8. 88 intervjuo pri la 73-a UK, sept. 88 informo pri lerneblecoj de E, 8. 10. 88 junulara renkontiĝo en Biesenthal, 15./16. 10. 88 E-libro (kun bildo), 28. 10. 88 varbo por Sanssouci-gvidlibo en E, 5./6. 11. 88 komputora sistemo Esparol;
— Der Morgen, LDPD, ekster la serio, 8. 4. 88 seminario de la arto en Halle, 27. 5. 88 pupteatro en E, 5. 7. 88 pri Ido, 26. 10. 88 E-agado en Cottbus;
— Bauernecho, DBD, 19. 1. 88 internacia E-kontaktoj en Schwerin, 26. 2. 88 E-broŝuro pri naturprotektado, 15./16. 5. 88 internacia kontrakto inter Schwerin kaj Piła;
— Neue Zeit, CDU, 20. 8. 88 tutpaĝe pri E kaj E-movado;
— Junge Welt, FDJ, 12. 10. 88 junulara renkontiĝo kaj E;
— Tribüne, FDGB, ampleksa intervjuo pri E (kun bildo), 3. 11. 88 komputora sistemo Esparol, El Jundi anstataŭ E?;
— Sonntag, Kulturbund, 3. 1. 88 100-jara E, febr. 88 E-aranĝo, tri leteroj de legantoj pri E, majo 88 pri „El Popola Ĉinio";
— Horizont, n-ro 4/88 E-agado, n-ro 5/88 pri E-simbolo;
— Wochenpost, 8. 1. 88 internacia E-agado, n-ro 22/88 anonco de E-kurso perletera, n-ro 33/88 anonco de „La racia lingvo";
— Mitteilungsblatt, Kulturbund, n-ro 1/88 memoriga tabulo por Zamenhof (kun bildo), n-roj 3/88, 4/88, 6/88 6 informoj pri E-agado en GDR;
— Pionierleiter, FDJ, n-ro 8/88 pri E-agado dum la 8-a Pionira Renkontiĝo;
— Standpunkt, evangelia gazeto, n-ro 3/88 tutpaĝe pri E-historio kaj movado;
— Urania, n-ro 1/88 respondo al letero de leganto;
— Urania-Mitteilungen, n-ro 9/88 informo pri E-lerneblecoj;
— Beiträge zur Geschichte der Arbeiterbewegung, n-ro 6/88 pri LEA-anoj en Turingio; 44/684 cm

2. Distriktaj gazetoj

2.1. Berlin

— Berliner Zeitung, 2. 1. 88 anonco de E-kurso en vespera lernejo, 23./24. 7. 88 informo pri E-gazetoj en GDR, 25. 7. 88 E-Centro en Białystok, 1. 11. 88 komputora sitsemo en E;
— Humboldt-Universität, 24. 11. 88 pri la 9-a interlingvistika seminario;
— Zeichen der Zeit, n-ro 4/88 dupaĝe pri E; 6/111 cm

2.2. Cottbus

— Lausitzer Rundschau, SED, 20. 1. 88 E-kunsido de la Centra Estraro, 30. 1. 88 E enkadre de Kulturligo, 26. 2. 88 kaj 1. 3. 88 sama temo, 25. 3. 88 E-movado, 12. 4. 88 informo pri intervjuo kun E-istino en radio, 6. 5. 88 mallonga informo pri E-aranĝo, 3. 8. 88 varbo por E-kurso kaj invito al E-kurso, 23. 9. 88 informo pri E-kurso, 30. 10. 88 E-agado en la distrikto, 26. 10. 88 invito al E-renkontiĝo;
— Hoyerswerdaer Blätter, n-ro 1/88 pli longa varba artikolo pri E;
— informmaterialo, sendata, invito al E-kunveno, E-ekspozicio;

2.3. Dresden

— Sächsische Zeitung, SED, 7. 1. 88 pri E-movado en Meißen, 26. 3. 88 E-ekspozicio pri japana porcelano, 2. 4. 88 sama temo, 2. 7. 88 pri antifaŝisma batalo de E-istoj, 29. 7. 88 73-a UK amplekse, 23. 9. 88 invito al E-kurso, 15. 11. 88 personaj kontaktoj kun francaj E-amikoj, 16. 11. 88 distrikta E-kunsido, 17. 11. 88 amplekse pri E-klubo en Riesa, 2. 12. 88 E-lernado per komputoro, 1. 12. 88 pri TEJO, 3. 12. 88 varbo por E-lernado;
— Union, CDU, 21. 7. 88 E-istoj el Dresden al la 73-a UK, 20. 9. 88 du kontribuoj pri la 73-a UK kaj la historio de E, 4. 1. 88 komputoro helpas al E-lernado;
— Bauernecho, DBD, distrikta E-konferenco, 16. 11. 88;
— TU-Zeitung, teknika universitato, 1. 1. 88 varbo por E-kurso, 16. 11. 88 informo pri komenca E-kurso;
— Freizeit aktuell, dec. 88 pri internacia komprenilo E;
— Programm, jan. 88, 100 jaroj E; 21/391 cm

2.4. Erfurt

— Das Volk, SED, 15. 1. 88 pri E, 8. 3. 88 informo pri komenco de E-kurso, 14. 4. 88 urbogvidilo en E, 18. 5. 88 pri E, 16. 11. 88 renkontiĝo de junaj E-istoj en Biesenthal, 18. 11. 88 komputoro por E-lernado;
— Thüringer Tageblatt, CDU, 19. 1. 88 E-kurso en vespera lernejo, 20. 2. 88 pri la 73-a UK, 8. 3. 88 varbo por E-kurso, apr. 88 artikolo pri E-lingvo kaj movado, 14. 4. 88 distrikta E-renkontiĝo, 15. 10. 88 parto de lingva serio;
— Thüringische Landeszeitung, LDPD, 16. 4. 88 E kiel internacia komunikilo, 21. 4. 88 sama temo, 1. 7. 88 pri E-kolektajo en muzeo, 29. 10. 88 1-a Centra Junulara E-Renkontiĝo;
— Thüringer Neueste Nachrichten, NDPD, aug. 88 pri internaciaj E-korespondrilatoj 21. 9. 88 E-gazetoj en GDR, 9. 12. 88 pri TEJO kaj junulara E-movado;
— Der Fahrzeugbau, uzina gazeto, 1. 11. 88 pri E-junularo; 21/341 cm

2.5. Frankfurt/Oder
— Neuer Weg, SED, 15. 3. 88 varbo por perletera E-kurso;
— Der Morgen, NDPD, 16. 3. 88 sama informo; 2/8 cm

2.6. Gera
— Volkswacht, SED, pri E-agado kaj varbo por E-kurso; 1/16 cm

2.7. Halle
— Freiheit, SED, 12. 3. 88 pri E-movado kaj agado, 7. 5. kaj 10. 5. 88 informo pri la internacia kulturarangô de la E-junularo kaj invito, 12. 5. 88 pli amplekse pri la sama temo, 17. 5. kaj 18. 5. 88 informo pri la finita arangô kaj resumo, 23. 6. 88 invito al informa vespero pri E, 23. 8. 88 E-kontribuo al Tagoj de Kulturligo, 1. 9. 88 invito al E-prelego, 2. 9. 88 E-Asocio en Kulturligo, 26. 10. 88 informo pri E-vespero;
— Liberal-Demokratische Zeitung, LDPD, 31. 3. 88 antaŭrigardo al „semajno de arto" en Halle, 5. 5. 88 E-turismo al Bydgoszcz, 10. 5. 88 dufoje: internacia kulturarangô de E-junularo (mallonga informo kaj pli detala), 13. 5. 88 sama temo, 16. 5. 88 fino de la sama arangô, 21. 6. 88 invito al E-kunveno, 24. 6. 88 invito al E-vespero, 6. 9. 88 E-gazetoj en GDR, 2. 12. 88 TEJO kaj MFDJ;
— Der Neue Weg, CDU, 10. 5. 88 dufoje: mallonga informo pri la internacia junulara kulturarangô kaj pli detala kontribuo, 17. 5. 88 pli detale pri la sama temo, 16. 6. 88 invito al nova E-kurso, 25. 6./23. 7./3. 9. 88 serio pri E, 20. 8. 88 anonco de vespera lernejo i. a. pri kurso, 2. 9. 88 mencio de E-ekspozicio inter aliaj kulturarangoj, 28. 10. 88 invito al E-arangô;
— Neueste Nachrichten, NDPD, 10. 5. 88 unufraza informo pri E-arangô kaj pli detala artikolo, 17. 6. 88 invito al E-kunveno, 21. 6. 88 informo pri E-arangô, 25./26. 6. 88 sama enhavo;
— Leuna-Echo, uzina gazeto, 17. 5. 88 internacia E-kulturarangô, 1. 7. 88 pri „la racia lingvo";
— Aufwärts (Buna), uzina gazeto, 17. 5. 88 internacia E-kulturarangô;
— Bahn frei, uzina gazeto, 23. 6. 88 E la racia lingvo;
— Universitätszeitung, 4. 2. 88 E kiel fremdlingvo en universitato, 12. 5. 88 pri la E-junulara arta arangô; 42/729 cm

2.8. Karl-Marx-Stadt
— Freie Presse, SED, 23. 1. 88 pri someraj ferioj en E-medio, 20. 2. 88 varbo por perletera E-kurso, 24. 3. 88 invito al E-vespero, 29. 3. 88 E-agado en la distrikto, 28. 4. 88 internaciaj partneraj rilatoj, 7. 5. 88 E-istoj festis la 1-an de majo, 29. 5. 88 E-agado en la distrikto, 24. 6. 88 E-agado en la subdistrikto, 9. 7. 88 E-kontaktoj, 4. 8. 88 sovetia E-isto en Schwarzenberg, 28. 8. 88 resumo pri la 73-a UK, 21. 9. 88 E-agado kaj varbo al kurso, 11. 10. 88 11-a internacia turista renkontiĝo, 26. 10. 88 E-renkontiĝo en Biesenthal, 16. 12. 88 bona bilanco de E-agado en la subdistrikto;
— Vereinte Kraft, uzina gazeto, 18. 4. 88 E-agado dum la 8-a Pionira Renkontiĝo;
— Kontakt, majo 88 11-a Ĝenerala Konferenco de MEM (kun bildo) (ĉiuj el Schwarzenberg) 17/239 cm

2.9. Leipzig
— Leipziger Volkszeitung, SED, 6. 1. 88 verkoj de F. Lorca en E, marto 88 IFER 88, 14. 4. 88 E-agado en Kulturligo;
— Mitteldeutsche Neueste Nachrichten, NDPD, 15. 3. 88 11-a IFER, 21. 9. 88 E-gazetoj en GDR, 7. 12. 88 Esperanto '88 en Havanna;
— Der Schmiedewerker, uzina gazeto, 16. 5. 88 pri honorigo de E-isto; 7/57 cm

2.10. Magdeburg
— Neuer Weg, CDU, 3. 3. 88 IFER '88 kaj E-agado en la respubliko, 14. 4. 88 IFER '88;
— Magdeburger Neueste Nachrichten, NDPD, 6./7. 2. 88 101-jara E;
— Magdeburger Zeitung am Wochenende, 4. 8. 88 E-istoj el M. en Torun (bildo);
— aktuell, uzina gazeto, n-ro 2/88 iomete pri E-lingvo, n-ro 17/88 E-muzikantoj en Torun (kun bildo); 6/120 cm

2.11. Neubrandenburg
— Freie Erde, SED, 5. 2. 88 pri semajnfina E-seminario, 19. 2. 88 pupteatro de Neubrandenburg prezentas en E, 2. 27. 88 pri nova E-kurso, 23. 3. 88 intervjuo pri nacia kaj internacia E-movado (kun bildo), marto 88 IFER '88, 28. 4. 88 E-agado en la distrikto, 13. 6. 88 E en akademio de gelernantoj, pri E-ferioj en Hungario kaj komentario al tio de redaktoro, 18. 8. 88 SEFT '88, 1. 9. 88 lando Esperanto en enuiga filmo, 24. 9. 88 varbo por nova E-kurso 30. 9. 88 pri klubagado, 10. 11. 88 semajnfina E-kurso, 19. 11. 88 E-prelego en malsanulejo, 9. 12. 88 E-kurso por radioamatoroj, 30. 12. 88 E-asocio en la subdistrikto;
— Norddeutsche Zeitung, LDPD, 19. 2. 88 pupteatro en E, 8. 3. 88 E-agado de junuloj en la distrikto;
— Norddeutsche Neueste Nachrichten, NDPD, 17. 2. 88 19-a semajnfina E-seminario, 1. 3. 88 pupteatro en E, 8. 12. 88 100-jara E, 10. 12. 88 radioamatoroj lernas E-n;
— Demokrat, CDU, 1. 3. 88 paskfesto en E, 16. 2. 88 kulturprogramo dum semajnfina E-seminario; 25/352 cm

2.12. Potsdam
— Märkische Volksstimme, SED, 16. 1. 88 pri artefarita „Omo", 27. 1. 88 informo pri E-vesperoj, 1. 2. 88 E-kurso en Kyritz, 19. 2. 88 — 80jaroj UEA, 11. 3. 88 IFER '88, 30. 3. 88 E-renkontiĝo kun S. Zamenhof, 8. 4. 88 semajnfina E-kurso, 4. 5. 88 invito al E-vespero, 4. 6. 88 varbo por E-lernado, 7. 6. 88 anonco de E-kurso perletera, 14. 6. 88 E-renkontiĝo en Großwudicke, 24. 6. 88 sama temo, 20. 7. 88 intervjuo pri perletera E-kurso, 28. 7. 88 PoSET '88, 1. 9. 88 sama temo, 30. 9. 88 pri ekzameneblecoj en E, kondolenco por Rosen Trenner, 5. 21. 88 parkgvidilo en E, 20. 12. 88 varbo por E;
— Brandenburgische Neueste Nachrichten, NDPD, 4. 2. 88 memoriga tabulo por Zamenhof, 21. 9. 88 E-gazetoj en GDR, 12. 12. 88 varbo por perletera E-kurso, E-agado en Rathenow;
— Der Wohnungsbauer, uzina gazeto, n-ro

17/88 pri interesa E-seminario en Lychen, n-ro 20/88 internacia E-renkontiĝo de junuloj (kun bildo), n-ro 7/88 klubvespero kun S. Zamenhof, 10/88 E dum gazetara festo, 15/88 DERSFIB '88; 28/301 cm

3.13. Rostock

— Ostseezeitung, SED, 9. 2. 88 pri E kaj E-movado, 12. 2. 88 kvar mallongaj informoj pri E-aranĝoj kaj pri lerneblecoj de E, 8. 3. 88 E-renkontiĝo en Stralsund, 6. 4. 88 ŝanĝo de E-bildkartoj kaj kalendaroj, 27. 4. 88 E-agado, 29. 6. 88 E-istoj en la Slovaka Paradizo, 30. 6. 88 honorigo de E-isto, 22. 10. 88 travivaĵoj en E-medio, 16. 11. 88 80 jaroj E en Rostock, E-kurso, 19. 11. 88 nova E-kurso, 3. 12. 88 UEA-seminario, 17. 12. 88 E-gasto el Japanio en subdistrikto, 22. 12. 88 E-agado en subdistrikto;

— Norddeutsche Neueste Nachrichten, NDPD, 9. 3. 88 E-renkontiĝo de E-junuloj, 7. 4. 88 bk-ŝanĝo, 28. 4. 88 E-renkontiĝo 2. 6. 88 internaciaj kontaktoj, 22. 6. 88 bildvortaro en E, 23. 6. 88 honorigo de E-isto, 29. 6. 88 E-istoj el Stralsund en Slovakio, 17. 9. 88 unua renkontiĝo kun ĉino en GDR; 21. 9. 88 5 E-gazetoj en GDR, 25. 10. interesa travivaĵo dum E-ferioj, 3. 11. 88 amplekse pri E-historio en Rostock, 14. 11. 88 E-kurso, 23. 11. 88 varbo por E, 26. 11. 88 E dum karnevalo, 6. 12. 88 UEA-seminario en Ahrenshoop, 7. 12. 88 komputora sistemo en E, 8. 12. 88 100 jaroj E, 15. 12. 88 E kaj porpaca strebado;

— Norddeutsche Zeitung, LDPD, 17. 9. 88 komento pri kortuŝa E-renkontiĝo, 20. 10. 88 distrikta renkonto, 1. 11. 88 E-okupiĝo de W. Plate (kun bildo), 4. 11. 88 E-gvidilo, 29./30. 11. 88 E-historio de Rostock, 3. 12. 88 UEA-seminario en Ahrenshoop;

— Der Demokrat, CDU, 4. 5. 88 E-gazetoj en Stralsund, 26. 5. 88 E-istoj en la Slovaka Paradizo, 23. 6. 88 bildvortaro en E, 31. 10. 88 pri E-historio en Rostock (kun bildo), 18. 11. 88 pri E, 2. 12. 88 E inter aliaj ŝatokupoj, 16. 12. 88 E-gastoj el Japanio;

— Fischfang, uzina gazeto, 9. 2. 88 pli amplekse pri lingvo kaj movado, 30. 6. 88 pri E-ferioj, 21. 7. 88 E-movado, 6. 10. 88 E-agado (Rügen), 20. 10. 88 E-katalogo, 17. 11. 88 junulara E-renkontiĝo, 15. 12. 88 internacia E-kurso, semajnfina kurso; 57/819 cm

2.14. Schwerin

— Schweriner Volkszeitung, SED, 26. 1. 88 internaciaj salutoj okaze de la jarŝanĝo, 11. 2. 88 E-kurso en vespera lernejo, 15. 3. 88 nova E-grupo, 5. 8. 88 internacia E-renkontiĝo en Schwerin, 12. 10. 88 E-kurso en vespera lernejo, 13. 10. 88 semajno de amikeco, 19. 10. 88 pri E-lernejo en Pisanica, 18. 11. 88 komputora sistemo en E;

— Norddeutsche Zeitung, LDPD, 6. 1. 88 jarŝanĝaj E-salutoj, 11. 1. 88 pri E-kontaktoj de W. Plate, 16. 3. 88 IFER '88, 1.7 3. 88 pupteatro en E, 2. 9. 88 internaciaj gastoj, okt. 88 80 jaroj E en Rostock, 4. 11. 88 E-gvidilo pri Sanssouci;

— Der Demokrat, CDU, 9. 1. 88 jarŝanĝaj salutoj, 9. 2. 88 nova E-kurso, 17. 2. 88 plej ampleksa E-biblioteko en Wien, 20./21. 2. 88 pri UEA-kongresoj, 2. 3. 88 E por radioamatoroj, majo 88 internaciaj partneraj rilatoj, 24. 6. 88 pri E-lingvo, 3. 9. 88 sama temo, 2-a parto, 5. 9. 88 internacia E-renkonto en Schwerin, 15. 10. 88 E-lingvo 3-a parto, varbo por E-kurso;

— Norddeutsche Neueste Nachrichten, NDPD, 6. 1. 88 internaciaj salutoj;

— Das Steuer, uzina gazeto, 12. 2. 88 E-informoj;

— Plastverarbeiter, uzina gazeto, 14. 10. 88 lernoknaboj okupiĝas pri E; 30/484 cm

3. Resuma pritakso

La 100-jara jubileo de Esperanto pasis, kun ĝi publikiga kulmino (ĝis nun).

1. Certe estas normala fakto, ke en 1988 la publikiga aktiveco entute ne fariĝis tiom granda kiel en la jubilea jaro. 327 kontribuoj pri Esperanto — lingvo, movado, historio, agado — aperis en la gazetaro de nia respubliko[1]), pasintjare 405. La amplekso de la kontribuoj estis same malpli alta — 470 cm. La lasta nombro ankoraŭ ne montras, ke en 1988 krom malmultaj esceptoj, tre ofte oni sendis pli mallongajn informojn al la redakcioj.
2. La diferenco inter la unuopaj distriktoj restis kiel en la pasintaj jaroj, sed en alia maniero: relative konstantaj estas la distriktoj Halle 42 (47), Neubrandenburg 25 (26); okulfrapa la plivigliĝo en Rostock 30 (13). Dank al ili kaj Potsdam 27 (20) la descendo ne fariĝis tro drameca. En Suhl nenio aperis pri Esperanto?! La nombro inter la krampoj montras la 1987-an rezulton.
3. La kontribuoj estis, kiel jam dirite, ĝenerale malpli ampleksaj. Superregis relative mallongaj, sed koncizaj informoj pri naciaj kaj internaciaj eventoj, kelkfoje ligitaj kun pli aŭ malpli detala sciigo pri Esperanto. Tre ofte la legantaro povis informiĝi pri la E-vivo en la distriktoj kaj subdistriktoj.
4. La nombro de skribintoj plimultiĝis kiel pasintjare. La artikoloj, kiuj aperis en diversaj publikajoj kun sama enhavo, estis plej ofte en diferenca stilo.

[1]) Levsen-Serio (23), sume 350.

Mallongigoj

SED = germana mallongigo por Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio
NDPD = Nacidemokratia Partio de Germanio
CDU = Kristan-Demokratia Partio de Germanio
LDPD = Liberaldemokratia Partio de Germanio
FDGB = Libera Germana Sindikata Ligo
FDJ = Libera Germana Junularo
UK = Universala Kongreso de Esperanto
IFER = Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo
SEFT = Somera Esperantista Familia Tendaro
PoSET = Potsdama Somera Esperantista Tendaro
MFDJ = Monda Federacio de Demokratia Junularo
LEA = Laborista Esperanto Asocio (ĝis 1933)

Kompilis Ingrid Mewes

Ludwig Schödl 80-jara

La Centra Estraro de GDREA tre kore gratulas al sia meritplena membro Ludwig Schödl, kiu festis sian 80-an naskiĝtagon, la 31-an de oktobro 1989.
La esperantista biografio de la jubileulo estas riĉa: Aktiva membro de GLEA, kunfondinto de la Centra Laborrondo Esperanto en la tiama Germana Kulturligo (1965), membro de ties prezidio kaj vicprezidanto, preleganto, gvidinto de multaj kursoj, aŭtoro de lernolibro kaj de koresponda kurso, mentoro, publikisto ... Ne eblas ĉion mencii. La kontribuo de Ludwig al la evoluigo de la Esperanto-movado en GDR estas tre granda. Ĉiam vigla kaj aktiva li estas unu el la plej aktivaj membroj de GDREA. Ke tiel restu ankoraŭ longe, ni deziras al li, kaj dankon pro ĉio donita al ni!

ĈE de GDREA

Hanna Scheffs 75-jara

Korajn gratulojn okaze de vivojubileo iras la 23-an de novembro 1989 al la membro de la Centra Estraro de GDREA, Hanna Scheffs. Ŝi eklernis Esperanton antaŭ 15 jaroj kaj tuj tiom ekaktivadis, ke oni elektis ŝin prezidantino de la Distrikta Laborrondo Esperanto Potsdam kaj de la Potsdama Distrikta Estraro de GDREA. Hanna tre lerte kaj celkonscie gvidis la laboron, kaj ankaŭ nuntempe daŭrigas sian aktivadon. Ni aparte dankas al ŝi pro la evoluigo de konkretaj ligoj al esperantistaj partneraj organizaĵoj en Bulgario, ĈSSR, Hungario, Pollando kaj Soveta Unio.
Jubileulino, restu sana kaj aktiva. Tion deziras al ŝi kaj al si.

Centra Estraro de GDREA

Helmut Fuchs 80-jara

La 18-an de aprilo 1989 la iama membro de Centra Laborrondo Esperanto, Helmut Fuchs el Pirna fariĝis 80-jara. La jubileulo estis i. a. tre aktiva en MEM kiel administranto de la landaj numeroj de „Paco". Ni postdate kore gratulas.

CE de GDREA

Miyamoto Masao 1913 — 1989

Forpasis unu el la plej eminentaj japanaj esperantistoj, membro de la Akademio de Esperanto, honora membro de UEA, Miyamoto Masao. Li forpasis la 12-an de julio 1989.

Ni kore gratulas al

— Drahomir Kočvara el Ostrava, ĈSSR, aktiva funkciulo de MEM kaj de ĈEA, kiu fariĝis 60-jara la 29-an de januaro 1989.
— Josef Vondroušek el ĈSSR, kiu fariĝos 85-jara la 1-an de decembro 1989. Li estas i. a. fama tradukanto de multaj perloj de la ĉeha literaturo, aparte de Čapek.

Ni funebras pro

— la forpaso de Georgi Cvetkov el Varna (11. 2. 89), kiu gvidis la Esperanto-societon „Albatroso" en Varna kaj la tiean turisman oficejon.

Antaŭ la tria prelegaro en la Universitato

En la jaro 1988 komenciĝis en Humboldt-Universitato Berlin regulaj prelegaroj pri interlingvistiko. Dum la aŭtuna semestro 1988/89 doc. d-ro sc. Detlev Blanke prezentis per 9 duhoraj prelegoj enkondukon en interlingvistikon kun aparta konsidero de planlingvoj. Dum la printempa semestro 1989 li ripetis la temon per 11 unuhoraj prelegoj. La aŭskultintoj venis el diversaj fakultatoj, estis studentoj kaj membroj de la universitata instruistaro.
Por la aŭtuna semestro 1989/90 li prezentos enkondukon en la esperantologion.

Nova sonbenda servo de GDREA

La Centra Estraro de GDREA komplete renovigis kaj modernigis sian sonbendan servon. Nun disponeblas sur 31 60-minutaj kasedoj entute 51 programoj diverslongaj. Inter ili:

- **a) 4 germanlingvaj programoj pri Esperanto (i. a. radiodisaŭdigoj),**
- **b) 12 prelegoj de internacie elstaraj fakuloj pri diversaj temoj rilatantaj Esperanton,**
- **c) 3 registroj de kongresaranĝoj (63-a UK 1978 en Varna, 65-a UK 1980 en Stockholm, 72-a UK 1987 en Varsovio),**
- **d) 2 metodikaj sonbendoj por aŭtodidaktoj,**
- **e) 2 programoj kun prononcaj specimenoj de diverslandaj esperantistoj,**
- **f) 7 literaturaj programoj (prozo kaj poezio),**
- **g) 14 programoj kun kanzonoj, kantoj, arioj kaj korusaĵoj.**

Informojn pri la kompleta programo kaj kondiĉoj de mendoj petu ĉe la Centra Estraro de GDREA (Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080). Por 16 (!) programoj la mendintoj aldone ricevas la tekstojn. La sonbenda servo estas nur por enlanda uzo.

Dua Centra ekzameno

La duan centran ekzamenon de GDREA (Sprachkundigenprüfung I), kiu okazis la 2-an de julio 1989 en Berlin, partoprenis 14 personoj. Oni disdonis jenajn notojn: 4 x tre bone (1), 8 x bone (2), 2 x kontentige (3). Jenaj ekzamenitoj sukcesis:

Albert Bucholski, Irene Gliese, Gerhard Hirschmann, Marcus Krüger, Siegfried Koch, Jens Merker, d-rino Alheid Patzke, Rainer Pauli, Bodo Potratz, Brigitte Raabe, Marlies Radeck, Cornelia Rau, Bert Schumann, Jana Zettier. Gratulon al ĉiuj.

„EPĈ"en ses bibliotekoj de GDR

La interesega jurnalo „EL POPOLA ĈINIO" nun ankaŭ estas abonata de la Internacia Biblioteko (Lutherstr, 20, K.-Marx-Stadt, 9023), menciita en „Saksa Kuriero" (Leipzig) kaj „Balta Maro-Informilo" (Rostock). Krom tio ankaŭ la urbaj bibliotekoj de Lübtheen, Zarrentin, Boizenburg/Elbe, Wittenburg kaj Hagenow en la subdistrikto Hagenow (norda GDR) posedas ĝin ekde oktobro 1988. La subdistrikta E-grupeto intencas regule transdoni germanigitajn enhavtabelojn al la menciitaj bibliotekoj.
Ĉu ne ankaŭ via urba biblioteko intencas aboni ĝin?

Esperanto-grupeto Hagenow,
André Weber,
PF 70/56, Hagenow 2820

BEL '89

La Esperanto-grupo Panorama en la urbo Halle aranĝos je la 18-a de novembro 1989 la Borson de Esperanto-literaturo. Ĉiu partoprenanto havos la eblecon, vendi, aĉeti kaj interŝanĝi Esperanto-literaturon kaj Esperantaĵojn. Malgranda kulturprogramo servos por distriĝo. Pro pluaj informoj skribu al s-ino Sabine Johl, Hanoier Straße 22, Halle, 4070.

Ora Bukceno. Ĉina popola rakonto. Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. Adaptita de Úang Ĉjiĝong, ilustrita de Ĝjang Úejju. 40 paĝoj.

En 38 bildigitaj scenoj, ĉiu kun mallonga teksto, prezentiĝas la aŭdaco de juna fiŝisto kiu, kontraŭ la atakoj de la naturo kaj malgraŭ la firma rifuzo de la Reĝino de la Maro, strebas akiri ties belan filinon. La detalemo de la multkoloraj pentraĵoj kaj la tre konciza teksto kiu per malmultaj vortoj priskribas multajn eventojn taŭgas por infanoj de almenaŭ kvinses jaroj. Bele prezentita fabelo, en kiu la amo povas ekflori nur dank' al la insistemo kaj la korpa forto de la heroo.

U. Becker

Vaha, Blazio: „Adolesko". Originala romano. Eldonis: Oy Mendoservo Ak (Finnlando) kaj Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1987. (248 paĝoj)

Ŝajne strangan, sed samtempe tute normalan Jozefon la leganto de tiu romano akompanas tra la kutimaj fazoj de junula vivo — ekde infanjaraj observoj ĝis prijuĝa memstariĝo en inteligentulara medio.

Obeanta kaj rezistema, fideleca kaj sendependema, timema kaj ribelema, kontaktavida kaj introvertita knabo, gimnaziano, soldato, studento, viro, li pli kaj pli konsciiĝas pri siaj trajtoj, suferoj, venkoj, fiaskoj, ekkonoj, disreviĝoj en la unuaj 25 jaroj p.K.M. (t.e. post Kvinjara Milito), en la lando Miloĝio, en ĝenerala reciproka amo/malamo laŭ la formulo

$$\frac{n\ (n-1).}{2}$$

Ĉu vere reciproka amo estas alcelata dum la ensociigo de juna, adoleskanta homo fare de la decidaj potencoj — de la religiigaj, pionirigaj, klerigaj, patriotigaj, soldatigaj, sciencigaj instancoj?

Ĉu la destina alternativo por feliĉigo/feliĉiĝo de la popolo vere estas simple aŭ „Dia regno ĉiela" aŭ „Tera komunismo"?

Ne, la vivo, almenaŭ el la vidpunkto de adoleskanto, elreliefiĝas kiel interplektaĵo da vojoj, kiel merdoplena puraĵo, kiel kredoabunda ateismaĵo.

Kio estas peko? Ĉu jam la imago pri femuro de knabino? Ĉu jam la supozo pri eventuala egalrajteco de aliaj religioj aŭ jam la neĉiuminuta konsidero de la socialisma ordo?

Ju pli Jozefo sentas sin subpremata, des pli ekfunkciadas liaj sentoeligiloj, liaj pensoglandoj. Tiu konflikto ĉiam denove pliakrigas lian apostatiĝon. Li forlasadas siajn kredojn, konvinkojn por enpense krei novajn idolojn:

— Plialtigo de la klereco de la popolo per publikigo de „Normoj de la Kristana vivo ĉe socialismo" (p. 92).

— Akiro de la vera amo per materiistiĝo post deviga antaŭa kredo je Dio (p. 192).

— Dioplaĉa servo al la „praŭdo", t.e. al la pravigitaj de leĝo moroj, laŭ kiuj oni devas konfesi, ke Dio ne ekzistas (p. 242).

Jozefo-adoleskanto klopodas, devigas sin, unuecigi la realajn kontraŭdirojn, enkape krei ekvilibritan mondkoncepton, klarigante al si la disŝiritecon de la homaro per nura ruzaĵo de Dio:

„... jes, eble vere la kredo **ek**estis kaj ekestas per ne-sciado, tamen ne **identas** kun ĝi, estas nur ruzaĵo de Dio, ke la homaro per **eraroj** konkludas **veron.**" (p. 223)

Sed li ne kulpigas aliulojn pri siaj oftaj fiaskoj en la lernejo, armeo, familio, socio, amo — li rigardas sin mem ne kapabla vivi laŭ la dek religiaj ordonoj (Dekalogo), estante en daŭra interna batalo kontraŭ la plifortiĝantaj seksaj ekscitiĝoj:

„Mi memoras, ke irante sur ponto ... mi devis kvarfoje turni min, turmente, flanken, al la barilo, por ke la preterpasantoj ne rimarku mian erektiĝon, kaj mi proksimume dudekfoje timiĝis, ke mi ĵus ekhavis mortan pekon pro imago de io malĉasta." (p. 217)

Ĉu li havas, -is, -os psikan difekton neforigeblan, kiu malutilas al li esti libera por krei socialismon? Aŭ ĉu li reprezentas longtradician tipon, kiu revas utili al la socio, konsciante la proprajn angorojn, ĝenojn, makulojn, katenojn, pudorojn? „Li estis kontenta, ke nun jam ne nepre li estos malutila, ja ankaŭ li jam apartenas al la unueca marksisma-leninisma amaso de la lando ... Li eĉ preĝis, en kondicionalo: Patro nia, se vi tamen estus, Via nomo estu sanktigita ..." (p. 159)

La sentiveco de Jozefo respeguliĝas en la eksterordinara sinsekvo kaj la esprimo de liaj pensoj en la taglibraj notoj, aludoj, prijuĝoj, kondamnoj, rimorsoj, imagoj. Ĝi estas nekutima pro la eltrovo de „tempperiskopo", kiu aŭtomate enŝaltiĝas en la cerbo por paraleligi afinajn aferojn el plej diversaj vivoperiodoj, ĝi estas ekster-

ordinara pro la adekvateco de la uzitaj vortoj, formoj, kunmetaĵoj, sonimitaĵoj, frazkonstruoj al la permesindaĵoj de la Fundamento. Tre instige sur la imitemon de leganto povus efiki tiaj modeloj:

Tuŝviziti (pri migraj birdoj) (p. 84),
sendi de ĉefestro al estroĉefo (p. 194),
iri al larmej'-lernej' (p. 202),
er-ar-iĝas ĉio verdinta (p. 147),
mi volus anti, ne ati (p. 204),
kvaronhoro, horkvarono (p. 178),
tustusis lokomotivo (p. 32),
la propra propieda sufero pliis la prolian (p. 20).

Ec lingvaj aludoj pri la germane influita historio de la Miloĝia popolo elvokas intensan cerbumadon por solvi la „enigmojn": „Mi fartas pace ... ĝis mem la fino de la laboro, ‚lejbieramt' — oni diras" (p. 176). „Nin ne interesas la instruistino en la lernejo Ajncvaj." (p. 88)

Enhave, lingve kaj strukture la romano malkovras neatenditajn dimensiojn, liveras abundon da diskutindaj vivoproblemoj. Prefere ĝi taŭgas por esti prezentata en formo de eltiraĵoj laŭtlegataj antaŭ esperantista publiko, kiu estas ideologie-intelekte serĉanta homan kaj homaranisman pliperfektiĝon, almenaŭ plialtigon de la esperantlingva sinesprimnivelo.

Aregon da duboj-demandoj eĉ tuŝe de mi nun ne mencieblaj, vi trovos en la libro, kaj kelkfoje vi certe ne sukcesos racie klarigi al vi iajn travivaĵojn de nia Jozefo, ekzemple la mistikan aperon de la tri verdoreluloj post mirakla naturfenomeno [p. 125—126]. Restos multe da libera spaco, kiun vi rajtas, eĉ devas plenigi per viaj propraj interpretadoj, ekzemple: kion kompreni sub la instrufakoj „trotuarologio, ŝose-historio" [p. 21 resp. 193], aŭ: pro kio la antaŭnomo de la amatino de Jozefo estas presita plejdiverse „Sunjo, Senjo, Sinjo, Sanjo?" Ĉu eraro de la verkisto aŭ de la kompostisto aŭ de la febranta amanto?

Fine vi sentos vin kunsortano, kunrespondeculo, kunvolontulo por plivalorigi la vivon de la individuo enkadre de, sub, ene de dogmecaj aŭtoritatoj. Kaj vi gajnos la eterne „Diamantan/diamantan" ekkonon, ke „vivis kaj vivos materiistoj kaj same kredantoj respektive **antaŭ** kaj **post** mil jaroj" (p. 138). Tiu ekkono eble savos vin de antaŭjuĝoj rilate al pruvo de memstara pensado de aliulo — la apostatiĝo: Mem restu, kvankam jam plenkreskulo, en spirita adolesko! Ne ostiĝu, ne fariĝu subtenanto de mense senmovi(ig)aj kaj sente frost(ig)aj trocertuloj! „Estas facile kredi, kio estas certa: sed entrepreni necertecon estas ankoraŭ pli heroe" (p. 139)

d-ro Till Dahlenburg
DSF 13, Brüel, GDR, 2722

Nia fidela leganto
el Danio skribis al ni:

Kara „der esperantist"!
Denove mi ricevis ekzempleron de via ŝatata „Mitteilungsblatt", kiu tre bone informas pri ĉio interesa en Esperanto-medio. Fakte ĝi estas nemalhavebla kaj necesa ilo precipe en la LEA-movado. Sen „der esperantist" estas truo en nia informado Esperanto-movada.
Mi sincere dankas, ne nur por mi mem, sed por nia tuta loka movado kaj familio, dezirante al vi daŭran sukceson.

Via dana K-do Kai Henriksen
Langesund 15, DK-2100 Kopenhago, Danio

Gratulojn al Georg F. Meier

La 20-an de novembro 1989, Georg Friedrich Meier, lingvisto kun multege da publicaĵoj kaj disciploj, fariĝis 70-jara. Li nun vivas en Olchingen ĉe Munkeno, FRG.
La Centra Estraro de GDREA, al kiu apartenis prof. d-ro Meier dum kelkaj jaroj kaj en kies kadro li faris gravan interlingvistikan agadon en GDR, elkore gratulas al la jubileulo kaj deziras ĉion bonan por la estonteco.

CE de GDREA

Ni kore gratulas al d-ro Till Dahlenburg, membro de la Centra Estraro de GDREA, kiu dum junio fariĝis „Supera Studkonsilanto".

Bulgario

14j. lernantino dez. kor. kun gelernantoj el GDR pri muziko, literaturo, dancado, kol. bk, afišojn: Dessislava Despodova, 7004 **Russe,** C-S „Locomotiv", Bl. „Enisei"

Ĉeĥoslovakio

Anoj de E-rondeto el **CS-54201 Žacléř** dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.:

— 35j. vendisto Petr Hejna, nám. J. Fučika 83,
— 59j. muzikinstruistino Hana Rejmanova, Mirová 359,
— 60j. kudristino Jarm. Štěpanova, Komenského 280,
— 45j. terkulturistino Edeltraud Minariková, n-ro 61,
— 58j. vendistino R. Spornikova, ul. Mirová 360,
— 27j. mašinteknikisto Vl. Ludvik, B. Němcové 362,
— 28j. oficisto Jiři Syrovatka, ul. B. Němcové 373,
— 22j. flegistino Jana Šnajdrova, ul. Horská 436,
— 24j. oficistino Judita Anderlova, Bobr 158.

Václav Stibor, K Elektrárné 498, **277 13 Kostelec n. Lab.** 33j., kun familio, dez. kor. kun germ. esp. kun familio p. ĉ. t.

GDR

Thomas Kielgaß, Schloßbezirk 08, **Pretzsch 4606,** 25j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, arto, ĉambroplantoj.

Komencanto, 36j. instruisto, dez. kor. tutmonde pri ĉiutaga vivo, ĝardeno, kaktoj, E-movado, kol. pm: Klaus-Dieter Schult, Wilhelm-Pieck-Str. 48, **Zepernick 1297**

18j. komencantino dez. kor. tutmonde kun samaĝaj esp. pri sporto, muziko, turismo: Angela Schütz, Hübnerstr. 7, **Berlin 1034**

18j. komencanto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Alexander Adam, Otto-Holz-Str. 9, **Dessau 4500**

Irina Ruschinski, Ebertystr. 9, **Berlin 1034,** 30j., dez. kor. tutmonde pri vivmanieroj, psikologio, kulturo, muziko.

Hungario

Komencanto, 20j., dez. kor. kun junulinoj: Lajos Magyar, **7900 Szigetvàr,** Rákóczi u. 15

Irano

29j. tapišdesegnisto dez. kor. tutmonde pri libroj, muziko: Sejid Ahmad, P. O. Box 51335 — 4194, **Tabriz.**

Pollando

Komencanto, 17j. studento, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, folkloro; kol. pm. bk: Jarosław Jaworski, **76-200 Słupsk,** str. Reymonta 3/m4

Komencanto, 35j. matematikisto, dez. kor. tutmonde pri montara turismo, fotoarto: Leszek Sikora, **41-800 Zabrze,** ul. Nad Kanałem 24/16

Komencanto, 21j. studento, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, sporto, fotado: Maciej Płociennik, ul. Bobrowskiego 14/4, **63-900 Rawisz**

25j. ĝardenisto dez. kor. kun gejunuloj tutmonde pri vivo, kulturo, medioprotektado: Mariusz Podkowa, ul. Nowowiejska 10/84, **82-300 Elbląg**

27j. komencanto dez. kor. tutmonde pri turismo, muziko, jogo, filozofio, šako, kol. pm, bk, librojn, diskojn: Adam Niedzień, str. Okrzei 24/4, **58--500 Jelenia Góra**

Komencanto, 21j., dez. kor. kun junaj esperantistoj pri geografio, kol. librojn: Petro Padło, Gostawice 73, **33-122 Wierzchosławice,** woj. Tarnowskie

Jacek Rybarczyk, ul. Towarowa 5, **64-000 Kościan woj. Leszczyńskie,** 21j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. pm, bk.

Grazyna Olszewska, ul. Sienkiewicza 13, **42-720 Herby Stare woj. Czestochowa,** 34j., dez. kor. pri geografio, turismo, Esperanto.

32j. oficisto dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, historio, muziko: Andrzej Mazurek, **08-110 Siedlce,** str. Chrobrego 15/44

39j. instruistino dez. kor. tutmonde, plej volonte kun mezaĝa virino pri literaturo, folkloro, turismo: Ludvika Małecka, str. Wodna 49, **44-200 Rybnik 1**

Komencantino, 23j. studentino dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, folkloro: Beata Leitloff, **00-905 Warszawa,** str. Konavskiego 49/15, osiedle „Przyjazni" na Jelonkach.

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, Aue, 9400
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16